

# ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

**N-ro 625 (12)**

**Decembro 1957**



**Universala  
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun  
U.N.E.S.C.O.)

*Bonvenon al Mainz*



*Gutenberg, la eltrovinto de la presarto,  
bovenigas vin al ora Mainz.*





## Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O)

Fondinto: H. HODLER

\* \* \*

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

\* \* \*

Ĉion por la redakcio oni sendu al la

Redaktoro: Mag. W. AULD

Knockfarril, Thornsidge Road, Johnstone, Renfrewshire, Skotlando.

\* \* \*

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo ESPERANTO (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

\* \* \*

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam C. Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu fian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1957): 7.50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 10 n.gld.).

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

\* \* \*

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo	128.— gld	1/2 paĝo	64.— gld
1/4 paĝo	32.— gld	1/8 paĝo	16.— gld
	1/16 paĝo	8.— gld	

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu du da vortoj.

Legantoj en 80 landoj

### Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

### Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo. Telefono: ARNold 90-81.

### ENHAVO

Zamenhof kaj Tolstoj . . . . .	177	43a U.K. . . . .	183
La satelito kaj ni . . . . .	177	CED . . . . .	184
Memortago anstataŭ jubileo . . . . .	179	La Internaciaj Konkursoj . . . . .	186
Trijara kunlaboro de UEA kun UNESKO	180	Tra la mondo . . . . .	187
Preslibereco kaj presdeliktoj . . . . .	185	Ŝaka rubriko . . . . .	189
Mainz . . . . .	191	Koresponda servo mondskala . . . . .	190
<b>Rubrikoj</b>		Radio . . . . .	190
Magnetofona servo . . . . .	178	Nia forumo . . . . .	191
Nekrologo . . . . .	178	Monda galerio . . . . .	192
La Juna Vivo . . . . .	182	Novaj libroj . . . . .	194
		Oficiala informilo . . . . .	195



# Zamenhof kaj Tolstoj

La 15an de Decembro 1859 naskiĝis Ludoviko Zamenhof en Bjalistok kaj post du jaroj ni festos la centjaran datrevenon de tiu tago en la historio de la homaro. Ke la malkomprenoj kaj malamaj kaŭzis la decidon de tiu genia knabo doni al la homoj mondlingvon kiel komprenilon kaj amikiĝilon, tion scias jam granda parto de la publiko. La fakto apartenas al la komuna tradicio de nia kulturo.

Tamen lia batalo sur la kampo de la spirito ankoraŭ daŭras kaj lia lingvo, kun siaj vivantaj flugiloj, ankoraŭ esprimas esperon kaj celon de bonvolaj pioniroj. Ĝi fariĝis pruvo ke li pravis. Ĝi respondas al profunda bezono de la nuna homaro, serĉanta sian animon, sed potencaj baroj ankoraŭ malhelpas la renkontiĝon inter la ĝenerala bezono kaj la preta respondo.

Sajnas kvazaŭ ĵaluzaj brakoj tenas la malsatajn buŝojn for de la pano, kiu povus ilin nutri. Longa, pacienca, kuraĝa laboro necesas ankoraŭ por alĝvidi la soifantan homaron al la kaŝata refreŝilo.

Sed kiom pli da pacienco kaj kuraĝo necesas al Zamenhof kiam li estis preskaŭ tute sola kun kelkaj fidelaj amikoj? Imagu lian ĝojon, kiam la rusa popola eldonejo Posrednik petis la opinion de la mond-fama verkisto Leo Tolstoj pri Esperanto kaj li publike respondis en Aprilo 1894: „Ricevinte antaŭ ses jaroj esperantan gramatikon, vortaron kaj artikolojn skribitajn en tiu lingvo, mi post ne pli ol du horoj, povis jam, se ne skribi, almenaŭ libere legadi en la lingvo... Mi vidis multfoje kiel homoj rilatis malamike nur dank' al materiala malhelpo je reciproka komprenado. La lernado de Esperanto kaj ĝia disvastigo estas do sendube kristana afero, kiu helpas al la kreo de la regno de Dio, kio estas la ĉefa kaj sola celo de la homa vivo”.

Tolstoj restis fidela al tiu opinio kaj kuraĝigo. Ĝus aperis en Parizo (ĉe la eldonejo Grasset) franca traduko de la leteroj inter li kaj lia amiko Paŭlo Birjukov, fondinto de Posrednik. Sur paĝoj 354—356 oni legas longan konsiladon de Tolstoj pri edukado de infanoj kaj dufoje li rekomendas tie la instruadon de Esperanto (5 Majo 1901).

Paŭlo Birjukov, lia biografiisto, post jaroj en Siberio, vivis en vilaĝo apud Genevo en Svislando kaj mi lin ofte vizitis kiel knabo kaj junulo. Tie ni renkontis lian noblan edzinon kaj ŝian fratinnon Anna Ŝarapova, kiu estis fervora samideanino kaj parolis bonege nian lingvon.

„Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas... Ni semas kaj semas konstante” skribis Zamenhof en fama poemo, sed en tiu okazo unu semo, ŝajne perdita, donis vivon al arbo memorinda, kiu siavice kreis arbaron. Sian lernolibron D-ro Esperanto sendis al Tolstoj en 1888. Pasis ses jaroj sen respondo kaj subite en 1894 venis la publika laŭdo kaj rekomendo de geniulo ĝuanta vastan moralan povon.

Por kompreni la ĝojon de Zamenhof, necesas ankaŭ memori lian personan admiron al la homara idealo de Tolstoj. De post 1880 la rusa verkisto ne plu kontentiĝis je nura literatura kreado. Li profunde pripensis tiam pri la signifo de la vivo kaj la problemoj de la personaj kaj kolektivaj homaj rilatoj. Al juna studento, kiu skribis al li el la Pariza Normala Lernejo (li estis Romain Rolland), Tolstoj respondis longan leteron la 4 oktobro 1887, kaj interalie diris: „Ĉio kio kunigas la homojn estas la belo kaj la bono, ĉio kio dividas ilin estas la malbelo kaj la malbono”. En sia verko „Kion fari?” li esprimis tion, kion li sentis kontraŭ socia maljusteco kaj preparado al militoj. Same kiel Romain Rolland, la juna Zamenhof estis fervora leganto lia, ĉar li tutkore konsentis lian alvokon al popoloj kaj sentis sin humila pioniro laboranta sur la sama vojo.

Edmond Privat

## LA SATELITO KAJ NI

Tiel do ni havas ĝin. La radio certigas: nun ĝi troviĝas ie super nia urbo. Antaŭ ol mi finos tiujn ĉi liniojn ĝi jam foros centojn da kilometroj.

Kiel ĉiuj altranguloj, ĝi ricevis multajn nomojn. Iom heterogenajn tamen, sed des pli karakterizajn. „Sputnik”-kunvojaĝanto estis la originala. En Britujo kaj Usono ĝi fariĝis satelito. Sed ankaŭ „Ruĝa Luno” aŭ „Blip-Blip” laŭ la sono. Kaj en Francujo? Kompreneble, familiare ĝi baptiĝis „Bebo-Luno”.

Ĉu ankaŭ la nomoj ne malkaŝas kelkfoje socian apartenon, edukitecon, politikan konvinkon aŭ nacian trajton? Estante neŭtralaj en tiu rilato, ni nomu ĝin satelito, tute simple.

Oni akceptis ĝin kun miksitaj sentoj. En Ruslando la popolo pie aŭskultis klerajn prelegojn, revis pri universaj larĝoj kaj forĝesis por momento pri la kelkaj kubaj metroj de sia individua loĝspaco. En Usono Nobel-premiito kaj famaj scienculoj kulpigis la „ĉason al sorĉistinoj” de McCarthy kontraŭ eminentaj specialistoj pro la perdo de tiu internacia konkuro pri satelitoj. La britaj gazetoj pli vigle ekpledis por kunigo de la atomaj klopodoj al tiuj de Usono. Sed ili ankaŭ raportis pri centoj da telefonvokoj al Aer-Ministerio: oni demandis kial la aviadiloj de la RAF ne ŝaligas la „ruĝan lunon”! En la kabaredoj de Montmartre la kanzonistoj kaj sprituloj trovis taŭgan objekton por freŝigi sian humoron. Prezidantino de grava asocio kondamne deklaris, ke la satelito estas „disigita de Dio kaj homo” kaj alvokis la virinojn savi la socion. Sur la registarojn kaj parlamentojn, politikistojn kaj diplomatojn, sciencajn laboratoriojn kaj preĝejojn, internaciajn konferencojn, UN, ILO, FAO kaj mi ne scias kiajn aliajn mallongigojn, ĉien poiome la satelito jetis sian neekzistantan ombbron.

Intertempe ĝi plue flugas. Sen



pasporto kaj sen vizoj. Jam pli ol 300 fojojn ĝi ĉirkaŭiris la terglobon. (Kiel malaktuala estos tiu ĉi artikoleto kiam legata!) Per sia inteligenta metala cerbo ĝi ekkonas la misterojn de la sfero de sia orbito. Kaj per sia blipblipa voĉo, iom jam malfortiĝinta, ĝi daŭre ion komunikas. Kelkaj diras, ke tio estas nur infana sensigniĝa petolado. Aliaj asertas, ke temas pri sekreta koda lingvo, kiun komprenas nur la gepatroj. Povas esti.

Sed ĉu ĝi eble diras ankoraŭ ion, kion eĉ la gepatroj ne komprenas?

Iusence pli inteligenta ol la Homo, kiu ĝin kreis, ĝi rigardas el sia majesta alto la mondon kiel unu tuton. Kun superece bagatelanta rideto ĝi malatentas ĉu pro tio oni proklamas ĝin „komunisto” en iuj landoj, aŭ „burĝa kosmopolito” en aliaj! Kaj ĝi libere diras, kion ĝi efektive vidas.

La esperantistoj edukigas — ne ĉiuj jam edukigis — rigardi la homaron kiel baze unuecan. Ili estas hodiaŭ ankoraŭ grandega malplimulto. Unu satelito certe ne tuj instruos ĉiujn aliajn homojn kompreni tiun veron. Sed morgaŭ estos pliaj satelitoj. Ne nur rusaj, sed ankaŭ usonaj kaj britaj kaj... Ne gravas. Ĉiele ili estos mondaj. Postmorgaŭ estos konkerita la luno. Sekvos la interplaneda vojaĝado... Kaj ĉiuj ĉi satelitoj kaj interastraj ŝipoj blip-blipos en horo: la mondo estas unu tuto, la mondo estas unu tuto!

La potenca admono, troviĝanta malantaŭ tiu voĉo el universo, fine devigos la homojn unuigi por ne pere. La Internacia Lingvo ebligas al ili krei tiun unuigon juste kaj egale, sen avantaĝoj por unuj aŭ diskriminacio por la aliaj. Saluton al vi, satelito monda, ĉar mi fidis, ke vi ne anoncas katastrofon, sed aŭguras epokon de feliĉo!

## Magnetofona Servo de UEA

La estraro de UEA aprobis dum sia paska kunveno ĉi-jara mian proponon pri fondo de Esperanta Sonarkivo (Magnetofona Servo) kaj komisiis min organizi kaj funkciigadi tiun novan servon de UEA.

Mia propono ne estis io tute nova, ĉar jam en la oktobra numero de „Esperanto” en 1954 S-ro Ole Nederland skribis pri tiu temo kaj povis poste multobligi la unuan liston de la „Magnetofona Esperantista Komunumo” kun pli ol 20 personoj. Ankaŭ S-ro Conrad Fisher publikigis antaŭ nelonge en diversaj revuoj artikolojn pri Usona voĉ-koresponda klubo; tiu „voĉponda” klubo interŝanĝas sonbendojn anstataŭ skribitajn leterojn.

La celoj de la nova Magnetofona Servo de UEA estas pli vastaj:

1. Kolektado de sonbendoj de prelegoj dum kongresoj, ISU, aŭ dum aliaj kulturaj aranĝoj; de radifoniaj disaŭdigoj; de divers-specaj klubprogramoj; de Esperanto-kursoj; pri edukado de denaskaj Esperantistoj; k.a.;
2. pretigo de listo pri la haveblaj sonbendoj, publikigota en la revuo „Esperanto” kaj la Jarlibro de UEA;
3. vendado kaj pruntedonado de kopioj de la kolektitaj sonbendoj al Esperantistaj organizoj kaj izoluloj;
4. organizado de Esperantlingva „voĉpondata”, publikigante liston de magnetofonaj korespondemuloj.

Por tuj komenci nian Magnetofonan Servon, mi jam sendis virgajn sonbendojn al Francujo por surbendigo en la Kulturdomo de Gressillon kaj dum la 42-a Universala Kongreso. Samkiale mi petas samideanojn, kiuj posedas altnivelajn surbendigojn en bona Esperanto, sendi tiujn sonbendojn al mi. Post kopiado mi resendos tiujn sonbendojn al ili, aŭ kun la originala teksto aŭ kun surbendigo de alia programo — laŭ ilia elekto.

Post kelka tempo estos publikigita listo de la jam kolektitaj kaj haveblaj sonbendoj en la revuo „Esperanto”.

Tiam estos la vico de Esperantistoj kaj precipe de lokaj grupoj, kiuj posedas aŭ aliel disponas pri magnetofono, mendi kopiajn bendojn ĉe mi. Jen la maniero:

- a. Ili sendu la bendon, sur kiu ni faru la kopion, al mi. Aŭ ili pagu la prezon de nova sonbendo. (Ĝi estas 3.25 kanadaj dolaroj por 2foje unuhora sonbendo je rapido 9 cm/sek, aŭ 2.15 kan.dol. por 2foje duonhora sonbendo je rapido 9 cm/sek.) Pro ekonomiaj kialoj ni uzos por kopioj la rapidon de 9 cm/sek. (= 3 $\frac{3}{4}$  coloj/sek), sed se oni nur disponas pri magnetofono kun rapido de 19 cm/sek., tiam ni ankaŭ povos fari tiajn kopiojn.

b. Ili pagu po 1.00 kan.dol. por 30 minuta kopiado. Tiu pago ebligas al la servo aĉeti pli da sonbendoj por pli grandigi la haveblan kolekton, entrepreni la necesajn tehnikajn kaj administrajn laborojn, kaj kovri la afrankon. (Se oni deziras rekomenditan ekspedon de la sonbendoj, oni aldonu 0.20 kan.dol.)

c. Se oni sendas al la Servo taŭgajn surbendigojn, kiujn ni kopias kaj akceptas en nian kolekton, ni rekompenca faros kopiojn de la triobla tempo de la akceptita materialo senkoste laŭ la elekto de la sendinto.

ĉ. Ili povas krome malpligi la kostojn per rondsendado de sonbendoj inter grupoj aŭ izoluloj. Ekzemple 12 diversaj kluboj povus aĉeti komune 12 diversajn sonbendojn. Mi sendos po unu sonbendon al ĉiu Klubo kun listo al kiu klubo tiu sonbendo estu sendata post unu monato. Tiam klubo n-ro 1 sendas sian bendon al klubo n-ro 2, n-ro 2 al 3, ..... kaj n-ro 12 al n-ro 1. Post plia monato la sonbendoj denove same cirkulas, tiel ke post unu jaro ĉiu klubo povis aŭdi ĉiun programon. Ili nun povas resendi la sonbendojn al la Magnetofona Servo, por ke ni surbendigu novajn programojn. Do por 12 duhoraj programoj ĉiu klubo pagus nur 3.25 + 4.00 = 7.25 kan.dol. Ĉiu klubo krome posedas unu sonbendon kaj povas tial en la venonta jaro ricevi 12 novajn duhorajn programojn por nur 4.00 kan.dol. (plus la afrankkostoj por la cirkulado). Por ke mi povu plenumi miajn taskojn bonvolu

1. pruntedone sendi al mi sonbendojn bonkvalitajn laŭ enregistra, lingvo kaj enhavo.
2. skribi al mi, kiu ŝatus akiri kopiojn kaj speciale kiu ŝatus partopreni rondsendadan cirkulon. (Bonvolu aldoni la rapidon de la aparato kaj kiom ofte oni ŝatus interŝanĝi, ĉu monate aŭ kvaronjare),
3. skribi al mi, kiu ŝatus voĉpondi (voĉe korespondadi) kaj pri kiuj temoj. Mi eldonas liston, kiun mi sendos kontraŭ respondkupono al ĉiu interesulo.

Magnetofona Servo de UEA  
Komisiito: R. Eichholz  
ĉe Esperanto Press  
Oakville, Ontario, Kanado.

## NEKROLOGO

Emery. La 28an de aŭgusto 1957 mortis 80-jara s-ro A. J. Emery (595 Hancock St., Brooklyn 33, N.Y., Usono).

Gabor. Mortis pro kormalsano la 27an de julio, 1957, s-ro George Gabor (733 West 183rd St., New York 33, Usono), 68-jara, FD de UEA.

Satelitoj, satelitoj!  
Homoj baldaŭ sur la lun'...  
Urĝas, urĝas! For hezitoj! —  
Pagu la kotizon NUN!

G-o



# Esperanto - Revuo de UEA

## Memortago anstataŭ jubileo!

Sepdek jaroj pasis post apero de la UNUA libro de la Lingvo Internacia de D-ro Esperanto. Longa kaj dornoplana estas la vojo al sukceso, tion ni ĉiuj devis sperti. Sed bona ideo ĉiam venkos dank'al la idealismo de pioniroj de l'unua horo kaj de la realismo de la posteuloj.

Idealiste plej pura li estis, tiu Paul Berthelot kiu en jaro 1905 redaktis kaj eldonis gazeton kun la konata titolo ESPERANTO. Eldonloko Cêret en la franca departemento „Pireneoj Orientaj”, 26 kilometrojn distance de Perpignan (hejmurbo de Estrarano de UEA, Llech-Walter.) Post du jaroj da eksperimentado, Berthelot cedis la gazeton al H. Hodler kaj pri tiu ĉi epoko ĉefe temas nuna memoriga artikolo.

La unua numero redaktita de H.H. datas de la 12a de Februaro 1907 kaj la lasta numero de li redaktita estis tiu de Marto 1920, monato kaj jaro de lia morto. La ĉefartikolo de la unua numero 1907 jam skizas la ĉefan ideon de H.H., realigotan unu jaron poste, per la fondo de UEA. Penetranta de la penso kunigi la *predikadon por Esperanto* kun ĝia *praktikado* en la ĉiutaga vivo, serio de artikoloj montris la vojon kiel fari. Rimarkinde estas, ke tiu ĉi serio de artikoloj „*Kiel uzi Esperanton*” ne perdis sian valoron, malgraŭ ŝanĝitaj tempoj kaj homoj.

La formato de la gazeto estis 48 cm alta kaj 34 cm larĝa, kvarkolona preso, kvarpaĝa. La prezo de unu numero estis dek centimoj, la abono tutjara tri frankoj. Titolo grandlitera, grasa por altiri la atenton. La titolo aperis ankaŭ sur la lasta paĝo, kiu ĝenerale enhavis propagandan artikolon kvarlingvan. La felietona parto komenciĝis per la traduko de „La L.St.1.000.000 banka bileto” de l'usona verkisto Mark Twain.

La nombro de abonantoj (kiuj pagis efektive) ne transpasis 1500, la vendo en kioskoj precipe francaj estis laŭ komerca vidpunkto perdo. La antaŭviditan deficiton kovris la redaktoro. La 30a numero, Majo 1908 informas pri la fondo de UEA, akcepto de la unua regularo kaj komitato. La dato de la formala fondo estis la 28a de Aprilo 1908.

La historio de la revuo ESPERANTO estas identa kun tiu de UEA. De 1908 ĝis 1910 oni provis, eksperimentis kaj batalis. Amuza por ni hodiaŭ estis la ŝanĝo de la formato 55 × 40 cm dum unu jaro, la „littuka periodo”! Tio finiĝis per

kompleta ŝanĝo, la akcepto de formato pli konvena 31 × 22 cm, proksimume sama ĝis 1939.

Depost 1911 reliefiĝas en la revuo de UEA la tendenco informi la legantaron pri la evoluo de la intergenta vivo, la kunlaboro interpopola. H.H. fakte estis la unua ĵurnalisto-redaktoro esperantista, dediĉante sin tute al la afero. Materie sendependa, li laboris sensalajre kaj kovris la deficitajn de la unuaj jaroj. La abonantaro kreskis kaj aro da talentaj kunlaborantoj donis al la revuo universalan reliefon. Inter la kunlaborantoj ni citu nur la nomojn de Profesoroj Cart kaj E v r o t, la unua por liaj filozofiaj „*Bileto de blankbarbulo*” kaj la dua por la rimarkinde verkitaj recenzoj, signitaj V e r t o. La lingva krizo en 1908 vaporiĝis ĉefe pro la agado de Profesoro Cart kun sia devizo „*ni fosu nian sulkon*” kaj tiu de H.H. aplikante ĝin en la praktiko. Venis la jaro 1914. Serio de artikoloj kun la titolo „*LA PACO, ĉu vi volas ĝin?*” kvazaŭ avertis pri la katastrofo. Post kelkmonata halto la revuo reaperis kaj fariĝis la voĉo homarana. Brilaj artikoloj pri ĉio kio tuŝas la militon kaj la pacon venontan alternis kun informoj praktikaj pri la helpagado de UEA, grandioza ideo de H.H. En iu senco nia revuo fariĝis danĝera pro la ideoj, tiel ke la franca registaro malpermesis la disvastigon en Francujo. Multaj el tiuj artikoloj estis tradukitaj kaj aperis en nacilingvaj taggazetoj.

Post la morto de H.H., Edmond Privat transprenis la rolon de redaktoro kaj venis la neforgeseblaj tagoj de la apero de nia lingvo antaŭ la areopago de la Ligo de Nacioj. La flua stilo de Privat, lia talento komprenigi komplikajn situaciojn mundumajn, kaŭzis la kreskon de la abonantoj kaj legantoj. Pasis la tempo de dumil ekzempleroj presitaj. En la plej bonaj jaroj inter la du militoj ni presigis meze 8000 ekzemplerojn po numero, atentinda nombro por internacia periodaĵo.

La ekonomia krizo tutmonda grave ŝanĝis la situacion. La organiza batalo finiĝis per reciproka akcepto kaj cedo, kaj ne laste dank' al la gvida talento de Edmond Privat. La du amikoj, Hodler kaj Privat, malsamaj laŭ karaktero, havis komunan platformon: la humanecon kaj universalan mondpercepton. Al H.H. iru nia memoro kaj al Edmond Privat nia varma penso kun sincera deziro de resaniĝo, kun espero vidi lin kaj la sindonan edzinon je la venonta kongreso en Mainz 1958, kvindek jarojn post la fondo de UEA.

Hans Jakob

*La modesteco de nia amiko Hans Jakob ne permesis, ke li menciu sian propran rolon en la progreso de nia oficiala revuo. Ekde 1912 li estis tute intime ligita al ĝi kiel Administranto kaj teĥnika redaktoro, kaj post 1936 li estis Ĉefredaktoro. Ankaŭ hodiaŭ li portas la titolon Honora Redaktoro, donitan de la esperantistaro rekone al liaj grandaj meritoj. — W.A.*



La 8-an de decembro 1954 la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo unuanime decidis establi kun Universala Esperanto-Asocio konsultajn aranĝojn. Du tagojn post tio, en la lasta kunsido de la Pleno, estis nuligita la malfavora decido de la Programkomisiono per la akcepto de la historia Rezolucio, en kiu UNESKO rekonis, ke la rezultoj atingitaj per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj, respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO. Per la Rezolucio estas por la unua fojo oficiale agnoskita la eduka, scienca kaj kultura valoro de la Internacia Lingvo fare de la plej grava interŝtata organizaĵo pri scienco, edukado kaj kulturo.

Ĉiun kvaran jaron la Ĝenerala Konferenco de UNESKO pritraktas la rezultojn de kunlaborado kun unuopaj internaciaj organizaĵoj, havantaj la pozicion de „konsultaj aranĝoj”. Tiucele la Sekretariato de UNESKO turnis sin ankaŭ al UEA kun la peto respondi al diversaj demandoj. Per sia letero de la 4-a de oktobro 1957, la ĝenerala sekretario de UEA sendis al la Sekretariato de UNESKO 14-paĝan respondon al la demandaro.

En la respondoj al la unuaj 8 demandoj estas donitaj informoj pri la nomo de la organizaĵo, sidejo, organoj, celoj, kategorioj de membroj, strukturo, ĉefaj aktivecoj precipe kongresoj, konferencoj, kursoj, CED, Internacia Somera Universitato, Belartaj konkursoj, delegita reto, Universala Ekspozicio, revuoj kaj gazetoj, publikaĵoj, radioelsendoj kaj metodoj de laboro.

En la p-toj 9-10 estas koncize prezentita la kontribuo de UEA al la laboro de UNESKO. Jen konciza resumo de tiuj ĉi punktoj:

1/ *Partopreno en konferencoj*: UEA estis reprezentita per observantoj en la Ĝeneralaj Konferencoj de UNESKO en Montevideo (1954) kaj en New Delhi (1956). Ĝiaj reprezentantoj partoprenis en la laboroj de la Konferenco de neregistartaj organizaĵoj, okazinta en Genevo de la 31-a de marto ĝis la 4-a de aprilo 1955 kaj de ĉiuj konferencoj de neregistartaj organizaĵoj en la UNESKO-Domo en Parizo. En la diversaj konferencoj la reprezentantoj de la Asocio tre aktive kunlaboris, tute speciale en la Laborgrupo pri Edukado al Internacia Kompreniĝo kaj Kunlaborado. La reprezentanto de UEA s-ro Jean Thierry el Parizo, estis elektita prezidanto de la subgrupo „Psikologiaj kaj Sociologiaj Faktoroj Koncernantaj Internacian Kompreniĝon”. Li plue okupas tiun funkcion.

2/ *Index Translationum*: CED liveris al la Sekretariato kompletan Bibliografion de ĉiuj tradukoj aperintaj en Esperanto post la Dua Mond-

## Trijara Kunlaboro de Uea kun Unesko

milito. Tiun gravan laboron faris ĝia kunlaboranto Mag. W. Auld. Parto de la materialoj estis publikigita en la Vol. 8 de tiu publikaĵo. La Sekretariato de UNESKO rekonis la kontribuon en la Antaŭparolo.

3/ *Scienca kaj Teknika Tradukado*: CED sendis al d-ro Holmstrom de UNESKO abundan dokumentan materialon pri tiu problemo. Parto estis utiligita en la verko „Scientific and Technical Translating and Other Aspects of the Language Problem”, publikigita de UNESKO en 1957. Ĉar, malgraŭ tiu kontribuo, la verko havas plurajn erarojn rilate Esperanton, CED sendis energian korekton rilate tiujn punktojn.

4/ *Eksperimentaj aktivecoj en la lernejoj*: Laŭ la sugesto de UEA, la landaj asocioj turnis sin al siaj Naciaj UNESKO-Komisionoj en la senco de la cirkulero UNESKO/Ed/Co-ord.Proj/23 de la 13-a de julio 1955 kaj proponis sian kunlaboron kaj helpon por internacia kontaktigo de la lernantoj. Tiu iniciato bedaŭrinde restis sen pozitiva rezulto.

5/ *Informa materialo*: Surbaze de kontrakto de la 4-a de aprilo 1957 inter la Sekretariato de UNESKO kaj UEA, estas eldonitaj pluraj fotoafişoj de UNESKO kun la teksto en la Internacia Lingvo. La tradukon kaj distribuon de la afişoj prizorgis UEA, sed la kostojn de presigo pagis UNESKO.

6/ *UNESKO-Novajoj*: La Informa Fako de UEA komencis publikigi en januaro 1956 specialan bultenon en Esperanto kun selektitaj novaĵoj el „The UNESCO Courier”, „UNESCO Features”, „UNESCO Chronicle” kaj aliaj publikaĵoj. Tiuj novaĵoj, mallongigitaj kaj adaptitaj al la karaktero de la Esperantaj revuoj kaj gazetoj, estas regule sendataj al ĉiuj Esperantlingvaj periodaĵoj. De la 1-a de januaro 1956 ĝis la 30-a de junio 1957 la Informa Fako de la Asocio notis 342 diversajn artikolojn kaj novaĵojn pri UNESKO kaj ĝiaj laboroj, publikigitaj en la Esperantaj gazetoj. Tre ofte okazis, ke la artikoloj kaj informoj estis tradukitaj el Esperanto en la naciajn lingvojn kaj publikigitaj en la nacilingva gazetaro.

7/ *La Internaciaj Kursoj en Frostavallen (1956) kaj en Grésillon (1957)* estis ĉefe dediĉitaj al UNESKO kaj ĝia laboro. La unua pritraktis en pluraj serioj da prelegoj la ĉefajn obstaklojn al internacia kompreniĝo kaj la laboron de UNESKO por forigo de la obstakloj. La dua rilatis al kulturoj kaj civilizoj de la mondo. Pri la kursoj raportis ankaŭ la regionaj nacilingvaj gazetoj.



8/ *Prelegoj*: En pluraj cirkuleroj UEA donis konsilojn al la landaj asocioj kiamaniere diskonigi la celojn kaj laboron de UNESKO kaj de UN per prelegoj, precipe okaze de gravaj datrevenoj, ekzemple la Tago de UN, La Tago de la Homaj Rajtoj k.s. Speciala prelego pri UNESKO kaj ĝia strukturo estis farita en Haarlem en la Internacia Somera Universitato (Prof. I. Lapenna). Alia prelego pri la Konferenco de UNESKO en Montevideo estis farita en Bologna (1955) antaŭ ĉiuj kongresanoj. S-ro Gian Carlo Figliera faris en februaro 1956 serion da prelegoj en pluraj organizaĵoj de 8 svedaj urboj pri „La Batalo de UNESKO kontraŭ la Rasaj Diskriminacioj”. Ĉeestis pluraj centoj da personoj. Pri la prelegoj raportis 17 svedaj gazetoj, eldonataj entute en 1,252.000 ekzempleroj. Post la prelegoj la ĉeestintoj ĉiam akceptis rezolucion, en kiu ili esprimis „sian plenan solidarecon kun la nobla penado de UNESKO”. Estrarano s-ro R. Liech-Walter faris en 1956 plurajn prelegojn en Hispanujo pri la celoj kaj laboro de UNESKO.

9/ *Dekjara datreveno de la fondiĝo de UNESKO*: Laŭ la iniciato de UEA la landaj asocioj kaj la lokaj societoj festis tiun eventon. Ĉi tie estas resumitaj plej mallonge nur la ĉefaj rezultoj:

Aperis entute 82 artikoloj kaj mallongaj informoj pri UNESKO kaj ĝia signifo en la Esperanto-gazetaro.

Ĉirkaŭ 200 prelegoj pri UNESKO estis faritaj en diversaj Esperanto organizaĵoj aŭ de esperantistoj en universitatoj, lernejoj, kulturaj societoj surbaze de materialoj liveritaj de UEA. En multaj okazoj la loka nacilingva gazetaro raportis pri tiuj aranĝoj aŭ publikigis artikolojn, tradukitajn el Esperanto. La tekston liveris la Informa Fako de UEA.

La Radio-stacioj en Zagreb, Bern, Roma kaj 3 stacioj de Rio de Janeiro disaŭdigis prelegojn pri UNESKO en Esperanto surbaze de materialoj liveritaj de UEA.

El ĉiuj partoj de la mondo la Esperanto-organizaĵoj sendis telegramojn kaj leterojn kun bondeziroj al la Ĝenerala Direktoro de UNESKO.

10/ *Oficialaj komunikoj*: Krom la diversaj proponoj, faritaj de la ĝenerala sekretario aŭ de la aliaj oficialaj reprezentantoj de UEA okaze de la konferencoj de neregistaraj organizaĵoj, la Asocio faris en marto 1956 kelkajn sugestojn pri la plibonigo de la rilatoj inter la Naciaj UNESKO-Komisionoj kaj la naciaj branĉoj de organizaĵoj en konsultaj rilatoj de UNESKO. — UEA proponis kelkajn plibonigojn en Index Translationum. — En februaro 1957, per dokumentita letero adresita al la Ĝenerala Direktoro, UEA esprimis sian starpunkton kaj faris kelkajn proponojn rilate la decidon de la Plenuma Komitato de UNESKO, per kiu tiu ĉi invitis la Ĝeneralan Direktoron konsulti

la Internacian Konsilantaron pri Filozofio kaj Humanismaj Sciencoj koncerne la eblecon entrepreni en 1959/1960 studon pri la demando de neŭtrala komuna lingvo. — Cetere, UEA en pluraj okazoj proponis sian kunlaboron en ĉiuj demandoj, kiuj koncernas la lingvan problemon en internaciaj rilatoj.

11/ *Kunlaborado kun la Naciaj UNESKO-Komisionoj*: Konforme al la Rezolucio 6.112, akceptita de la Ĝenerala Konferenco dum la Pariza Sesio, kiel ankaŭ konforme al la Rezolucio 7141 de la Programo por 1955/1956, sekcio Edukado, UEA sugestis al ĉiuj naciaj branĉoj proponi sian kunlaboron al la Naciaj UNESKO-Komisionoj. Fakte ĉiuj landaj asocioj faris la proponon, sed, ĝenerale parolante, ne renkontis adekvatan eĥon ĉe la Naciaj Komisionoj. Laŭ la ricevitaj raportoj tamen en pluraj landoj — ekzemple en Brazilo, Jugoslavio, Novzelando, Svedujo — establiĝis bonaj rilatoj inter la landaj asocioj, aliĝintaj al UEA, kaj la Naciaj UNESKO-Komisionoj.

Fine estas utile aldoni, ke UEA regule informis — ĉu rekte, ĉu pere de la Centro de Esploro kaj Dokumentado — ne nur la Sekretariaton de UNESKO, sed ankaŭ ĉiujn Naciajn UNESKO-Komisionojn pri ĉiuj aktivecoj de la Asocio kaj pri la plej gravaj eventoj en la monda movado por pli vasta utiligo de neŭtrala, supernacia komuna lingvo en internaciaj rilatoj. La ĝenerala sekretario de la Asocio havis ankaŭ plurfoje personajn konferencojn kun la diversaj funkciuloj de la Sekretariato.



Nia s-ano Wilhelm Stoll en Stuttgart havas kolekton de Esperantaj filatelaj dokumentoj pri la historio kaj evoluo de Esperanto, kongresstampoj, k.s., kaj Esperanto en la praktika korespondado de la esperantistoj. La 9 plej efikajn albumfoliojn li ekspoziciis en la sudgermana filatelista ekspozicio, okazinta en Stuttgart de 23.8 ĝis 1.9.1957.





# LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:

**Nicola Minnaja,**  
**Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo**

## En nova vesto kun novaj fortoj antaŭen!

En Marseille la Komitato de UEA akceptis la Statuton de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO \*). Per tiu decido TEJO fariĝis oficiale la junulara sekcio de UEA, al kiu apartenas aŭtomate ĉiuj asociaj kaj individuaj membroj de UEA malpli ol 25-jaraj. Same kiel ĉe UEA la supera organo de TEJO estas komitato, kiu konsistas el reprezentantoj de la junularaj sekcioj de la landaj asocioj de UEA. La komitato de TEJO do estas la „parlamento” de la esperantista junularo. Inter siaj membroj tiu „parlamento” elektas la „registaron”, nome la estraron, kiu plenumas ĝiajn decidojn kaj gvidas la administrajn aferojn.

Ĉiuj landaj asocioj de UEA havas junajn membrojn, sed nur malmultaj jam fondis junularajn sekciojn. Ĉu oni timas,

ke junulara sekcio eliros la gejunulojn el la ĝenerala asocio? Ĉu oni havas eble la iluzion, ke TEJO similas al tiu malbona lupo, kiu forglutis la bedaŭrindajn kapretojn?

Tiaj timoj estas senbazaj, ĉar laŭ la fundamenta organizprincipo de TEJO la membroj de junularaj sekcioj apartenas samtempe al la koncernaj ĝeneralaj organizaĵoj. La organiza aŭ interna kunligo de la junaj kaj la pliaĝaj esperantistoj estas do garantiita. Sed estas necese, ke eksteren la junulara movado agu memstare formante siajn proprajn rondojn!

Eklernante Esperanton junulo aŭ junulino havas specialan celon: krei amikan kontakton kun eksterlandaj gejunuloj. En la kurso li aŭ ŝi renkontiĝas kun aliaj junaj homoj, kiuj havas la saman celon. Ili do estas samcelanoj, kiuj tamen ne nur studas la internacian lingvon, sed ŝatas ankaŭ homan rilaton inter si. Iom post iom — kondiĉe ke lerta kursgvidanto stimuletas tion — formiĝas grupo,

kiu malebligas la disiron de la diligenta kolegaro post la kurso.

Por tiam garanti la ekzistadon kaj kreskadon de la junulara grupo, ĝia vivo devas esti plej eble vigla. La gejunuloj serioze perfektigu en la internacia lingvo kaj ankaŭ gaje kantu, ludu, dancu kaj ekskursu. Nur tiel esperantista junulara grupo povas daŭre sukcese konkuri kun aliaj junularaj rondoj.

Por montri al la ne-esperantistaj junularaj unuiĝoj la praktikan valoron de la internacia lingvo, ni devas interrilati kun ili, ekz. en lokaj, provincaj kaj landaj junularaj federacioj, en kies komisionoj kunlaboras reprezentantoj de la diversaj junularaj organizaĵoj. Tia kunlaboro havas kvazaŭ aŭtomate grandajn varbeblecojn.

Nun, kara leganto aŭ legantino, vi certe komprenas, kial la esperantista junularo bezonas siajn proprajn lokajn grupojn, provincajn ligojn kaj landajn asociojn, kiuj kune formas la Tutmondan Esperantistan Junularan Organizon. Se en via loko, provinco kaj lando ankoraŭ ne ekzistas junularaj sekcioj, bonvolu helpi ĉe ilia fondo.

Ĉiam kaj ĉie sonu nia voko: Kun la junularo antaŭen!

Richard Reuchlin  
Vicprezidanto de TEJO

\* La Statuto de TEJO estas publicita en la Jarlibro de UEA 1957, dua parto.

## 3-aj TEJO - SKIFERIOJ en AŬSTRUJO

De la 26-a de decembro 1957-a vespere  
ĝis la 5-a de januaro 1958-a matene.



Jen nia skihejmo. Bela, ĉu? La tuta kabano estas ekskluzive por ni rezervita kaj enhavas lokon por 30 gepartoprenantoj. Ĝi situas tre proksime apud la plej longa seĝlifto de la mondo kaj apud diversaj malplilongaj liftoj. En duonhora distanco situas la internacia skiflugejo Kulm (rekordo 120 m.). Estas belegaj ekzerc-kaj ekskurseblecoj por ĉiuj kapabloj.

Kelkaj allogaĵoj el nia programo: Internacia ĉampionskiado en alpkombino kun valida diplomo; Internacia Konkurso pri fotado dum la skisemajno; Internacia ekspozicio de pentraĵoj; ĉio ĉi kun premioj. Prezentoj de la itala horo „Gran Sasso”; fest-, lud- kaj dancvesperoj. Ni disponos pri radioaparatoj kaj gramofono.

La prezo por dek plenaj tagoj estas

(kiel jam indikite) aŭstr. ŝil. 450.— por TEJO-anoj kaj ŝil. 490.— por ne-anoj. Unu tago kostas unu dekonon de ĉi tiu sumo + ŝil. 5.— Aliĝoj por la tuta feriotempo estas preferataj.

La skirenkontiĝo okazos en la skiloko **Tauplitz-Klachau**, Stirio (Steiermark), proksime al **Steinach-Irdning**. Detalojn vi ricevos post aliĝo aŭ kontraŭ int. resp.-kupono.

Aliĝu tuj skribante al la jam tradicia gvidanto de la skisemajno:

**Heinrich Reiter, Salzburg, I, 557,**  
**Aŭstrujo**



La gvidanto de la skiferioj. Li gvidas ilin sambone kiel ĉi tiun boaton.



## SKIRESTADO DE ESPERANTO-JUNULARO DE SVISLANDO

En ADELBODEN (Skistacio en la svisaj Alpoj 1400 m. alta) 26-a de decembro 1957-a — 5-a de januaro 1958-a.

La du skisemajnoj de la pasinta vintro majstre sukcesis; pro tio ni rekomencos tiun ĉi vintron.

Ni vivos modeste en alpa lignodomo: la akvon ni alportos de ekstere, la junuloj dormos sur simplaj pajlomatracoj, la junulinoj ricevos litojn, ni kuirus mem sub la gvidado de lerta kuiristino-instruistino: ĉiuj do kunhelpos.

**Aĝo:** De 16 ĝis 30 jaroj.

**Prezo:** 90.— svisaj frankoj. Ĉio estas enkalkulita: loĝado, manĝoj, asekuro kontraŭ akcidentoj, 2 ekskursoj per skilifto, skikurso por komencantoj.

**Aliĝo:** Partoprenontoj, bonvolu kiel eble plej baldaŭ anonci letere vian partoprenon kun viaj nomo, antaŭnomo, preciza adreso, pasportnumero (la lastaj indikoj estas necesaj por la asekuro). Sciigu ankaŭ, ĉu vi estas skilernanto aŭ progresinto. Se vi deziras lupreni skiojn, menciu vian grandon. Samtempe kun la aliĝilo sendu la antaŭpagon de sv.fr. 25.— al Esperanto-Junularo de Svislando, Zürich, poŝtĉekkonto IV. 6291.

**Aliĝilo sen antaŭpago ne validas.** La antaŭpago ne estas repagebla.

**Informoj:** Petante pliajn informojn,

kunsendu internacian respondkuponon.

**Atentu:** Ĉar la nombro de la partoprenantoj estas limigita, aliĝu tuj. Ne estas eble partopreni nur parton de la skirestado.

**Aliĝadreso:** Cosette Giroud, Jonquilles 8, La Chaux-de-Fonds, Svislando.

La organizanto: Esperanto-Junularo de Svislando

## INTERNACIA RENKONTIGO POR STUDENTOJ

Internacia Studenta Centro Hald, kunlaboranto kun Viborg Esperanto-Klubo kaj Studenta Esperanto-Klubo Kopenhago, ĉisomere aranĝis internacian renkontigon de esperantistaj studentoj. Kvankam pro la malfrua komenco de la preparlaboroj ne multaj samideanoj anoncis sin por partopreno, rimarkinda estis la kvalito de la aranĝo kaj ĝia efiko al studentoj ekster niaj vicoj.

Dum tri tagoj la ĉeestantoj povis studi la Migrantan Ekspozicion pri Esperanto; la estrarano de TEJO Paul Ciliga ilustris ĝin per enkonduko pri la historio kaj uzebleco de Esperanto. En Esperanto parolis Birthe Traerup (Danlando) pri jugoslavia popolmuziko kaj d-ro Neergaard pri la aplikado de popularscienca literaturo en la lernejoj.

Eĉ al la tradicia kaj gaja „sabata vespera semajna-revuo“ la Esperanto-semajno donis sian stampon, esprimitan en diversaj lingvoj.

La sukceso de la ĉijara Esperanto-semajno kreis inter la studentoj konsider-

indan intereson pri la Internacia Lingvo, kaj surbaze de la faritaj spertoj oni klopodos pliampleksigi la aplikadon de Esperanto por la venonta sezono.

## MALLONGAJ INFORMOJ

\* Dum la pasinta somero la junaj esperantistoj de Denton, lernantoj en Egerston Park County School, faris sian kvaran viziton al Eŭropo. En la diversaj lokoj, kie ili estis gastoj de lokaj esperantistoj, ili faris kantkoncertojn en Esperanto, kiuj ricevis favoran kritikon ĉe la gazetaro. 20 junaj skotaj esperantistoj (inter 9 kaj 15 jaroj) faris ekskurson al la Kastelo de Edinburgo, kie la gvidisto donis klarigojn en Esperanto. En Tamworth 14 geknaboj lernantaj Esperanton (aĝo inter 7 kaj 11 jaroj) interŝanĝas desegnaĵojn kun lernejoj en Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Italujo, Nederlando, Pollando kaj Hispanujo. En Oldham la Verdstela Klubo daŭrigas regule sian aktivecon per koncertoj, ekskursoj kaj teatraj prezentoj. Ĉi tiuj novaĵoj montras, kiel ankaŭ en Britujo oni povas esperi pri rejniĝo de la movado.

\* Skolta Esperantista Ligo okazigis kunvenon la 10-an de aŭgusto ĉe la Skolta Jamboreo. Ĉeestis anoj kaj subtenantoj el sep landoj. La prezidanto, s-ro L. J. van Gulck, donis resuman historion de la Ligo, kaj diris, ke, kvankam la estraro de la skolta movado montras sin neentuziasma pri Esperanto, li trovis, ke multaj landaj reprezentantoj ĉe la jamboreo sufiĉe bone komprenas la mankon de internacia lingvo.



## 43-A UNIVERSALA KONGRESO

Mainz — 2-9 aŭgusto 1958 — Germanujo

### OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 2

Novembro 1957

gresano centpaĝan oficialan libron en Esperanto pri Germanujo.

**OFICIALA SEMINARIO:** La Loka Kongresa Komitato donis siajn aŭspiciojn al la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo, kiu okazos de la 26-a de decembro 1957 ĝis la 1-a de januaro 1958, sub la patronado de s-ro Franz Stein, Urbestro de Mainz. Pri „Kulturaj, politikaj kaj ekonomiaj demandoj de Eŭropo“ prelegos s-ro Franz Stein, d-ro W. Herrmann, s-roj G. Becker, G. C. Fighiera, N. Minnaja, R. Reuchlin, d-ro M. Schmidt, s-ro G. Ziegler.

**PROSPEKTO PRI MAINZ:** La Urbo Mainz decidis eldoni prospekton pri

la Kongresurbo en Esperanto, kiu estos dissendita al ĉiu kongresano.

**NOVA FILMO:** La Fermo Philips decidis eldoni en Esperanto sian filmon „Eŭropa Rapsodio“: la filmo estos montrata dum la Universala Kongreso.

**JUBILEO DE U.E.A.:** Universala Esperanto-Asocio celebros en Mainz, dum speciala festa aranĝo, la 50-jaran Jubileon de sia fondiĝo, kiu okazis en 1908 fare de la svisa esperantisto, s-ro Hodler.

**STATISTIKO:** (ĝis fino de oktobro) Aŭstrujo 4, Belgujo 6, Brazilo 3, Britujo 18, Bulgarujo 2, Danlando 3, Etiopio 1, Finnlando 1, Francujo 50, Germanujo 44, Hispanujo 4, Israelo 1, Italujo 14, Japanujo 1, Jugoslavio 15, Maroko 2, Monako 3, Nederlando 9, Norvegujo 4, Novzelando 1, Pollando 5, Svedujo 10, Svisujo 8, Urugvajo 1, Usono 2. Entute 212 el 25 landoj. (Pasinjtare 186 el 21 landoj).

G. C. Fighiera  
Konstanta Kongresa Sekretario

Pagu tuj kotizon 1958!

**GLUMARKOJ:** U.E.A., la landaj Asocioj kaj la Universala Kongreso povas liveri la kvarkoloran kongresan glumarkon. Prezo: 1 ĝerm. marko aŭ tri rpk. 3 steloj) por tri folioj de po 10 markoj.

**KARAVANO:** Anoncis karavanon: — Sveda Esperanto — Federacio, Tegelbacken, Stokholmo.

**DUA BULTENO:** Ĝi aperos en januaro kun ĉiuj informoj pri loĝado kaj ekskursoj. Por aperigi en ĝi anoncojn aŭ por kunsendi propagandilojn en Esperanto petu informojn al la Oficejo de la Universala Kongreso.

**REGISTRARA ELDONO:** La Germana Registaro donacos al ĉiu kon-



# CED

Centro de Esploro  
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo.  
Telefono ARNold 90-81

## REZULTOJ DE LA ENKETO PRI LA DENASKAJ KAJ ALIAJ INFANOJ PAROLANTAJ ESPERANTON

Fine de januaro 1957 Bulteno Gepatra entreprenis enketon pri la infanoj-esperantistoj kun la celo helpi al porinfanaj esperantistaj aranĝoj kaj kolekti informojn pri denaskaj esperantistoj. La ideo estis kolekti bazan materialon por pliaj studoj. En aprilo de tiu ĉi jaro CED donis sian apogon oficialiginte la enketon. Jam pli frue estis serĉita kontakto kun porinfana SAT-bulteno „Nia Voĉeto“, kies redaktoro promesis alvoki siajn legantojn por kontribui al la afero.

La materialo estas akirita dum 7 monatoj kaj la rezulto ne montras precizan realan situacion en iu dato. Esploron de lingva kapablo tio neniel ĝenas, ĉar ĉies lingvoscio estas notita laŭ la situacio en la momento de la respondo. Ĉar la celo estis origine praktika, la nombro de la demandoj estis malgranda. Tial ne rezultigis en ĉiu okazo sufiĉe precizaj respondoj por statistika esploro. Certe utilis ankaŭ informoj pri tiuj plenkreskuloj, kiuj en infaneco lernis Esperanton, kvankam ne denaske, sed en la enketo oni petis informojn nur pri personoj ne pli ol 18-jaraj. Nur en la okazo de denaskaj esperantistoj oni petis informojn sendepende de la aĝo.

La demandoj koncernis la nomon, adreson, sekson, naskiĝ-daton, de kiu aĝo la infano kutime aŭdis Esperanton, la Esperantan lingvoscion en tri kategorioj kaj kompare al la nacia lingvo, kiel ankaŭ informojn pri la uzo de Esperanto en la hejmo.

La kategorio A enkalkulas personojn, kiuj plene parolas kaj komprenas Esperanton. En la kategorio C troviĝas tiuj, kiuj nur sufiĉe komprenas, sed ne multe parolas. La meza kategorio B estas malfacile indikebla, ĉar ĝi rilatas al ĉiuj kazoj, klastigeblaj nek sub A nek sub C: ne granda parolkapablo, plena kompreno. La grupo B estas heterogena, konsistanta parte el junaj infanoj, kiuj ankaŭ la nacian lingvon ankoraŭ ne plene parolas, parte el pli aĝaj, kies lingvoscio pli-malpli stagnas. Ili ĉiuj tamen povos aŭ en oportuna situacio povus relative rapide atingi la nivelon A.

Entute kolektiĝis informoj pri 154 personoj. Inter ili estas infanetoj, kiuj estas esperantlingve edukataj, sed pro la juneco parolas ankoraŭ nenun lingvon, kaj infanoj, kiuj ne lernis Esperanton en la hejmo. Tiuj informoj estas bonvenaj por Bulteno Gepatra, sed por statistiko pri la lingvoscio de personoj hejme edukitaj en Esperanto restis nur 135.

Laŭ la landoj la materialo grupiĝis jene: Anglujo 7, Aŭstrujo 7, Belgujo 4, Bulgarujo 1, Ĉeĥoslovakio 17, Danlando 7, Finnlando 1, Francujo 34, Germanujo 31, Hispanujo 6, Hungarujo 2, Italujo 3, Jugoslavio 6, Kanado 1, Nederlando 10, Norvegujo 5, Polujo 1, Svedujo 7 kaj Usono 4.

El la menciitaj 135 la nivelon A atingis 37%, sed 47% el la 64 denaske edukitaj en Esperanto. El ĉiuj restis en C 40%, sed el la denaskaj nur 28%. La diferencoj tamen ne donas rajton por ĝeneraligo ĉar la grupoj estas tro malgrandaj. En ambaŭ grupoj la ĉeesto de infanetoj iom malpliigas la sukcesprocenton.

Se almenaŭ unu el la gepatroj regule uzis Esperanton en la hejmo, la infanoj atingis kategorion A en 51%—toj; se la uzo estis nur okaza, la procento estas 21 en tiu kategorio. En C restis en la unua kazo 23%, sed en la dua 60%. Tiuj diferencoj estas statistike signifaj. El 30 denaskaj esperantistoj, kies lingvoscio estas A, 29 estas regule hejme edukitaj en Esperanto.

Kiel oni povis atendi, pli grandan scion de Esperanto ol

de la nacia lingvo oni trovas nur en la aĝo antaŭ la lerneja tempo. Fakte ne pli ol unu, sesjarulo, parolas pli bone Esperanton ol sian nacian lingvon. Saman lingvoscion kun la nacia havas 16%, sed ankaŭ tiun ĉi rezulton oni ne rajtas ĝeneraligi.

CED esprimas dankon kaj gratulon al f-ino Sirkku Koivu, Helsinki (Untamontie 4 D 23), Finnlando, pro la bonege plenumita laboro. La rezultoj de la enketo, per si mem tre interesaj, certe povos esti utiligitaj kiel solida bazo por pliaj studoj.

## MALLONGAJ INFORMOJ

**Dokumento de CED en 4 naciaj lingvoj:** La dokumento CED/5 sub la titolo „Sepdek Jaroj de la Internacia Lingvo“, publikigita originale en Esperanto, aperis ĝis nun en la angla (multoblighita kun presita kovrilo), en la franca (presita kiel RDC/5), en la germana (presita kiel CED/5), en la sveda (presita en la speciala aŭgusta-septembra numero de „La Espero“).

**Unu artikolo en 8 naciaj lingvoj:** La artikolo de Prof. I. Lapenna „Sepdek Jaroj de la Internacia Lingvo“, publikigita en Heroldo de la 1-a de julio kaj en la julia-aŭgusta numero de „Esperanto“ (iom mallongigita), aperis, laŭ la ĝis nun ricevitaj informoj, en 83 gazetoj kaj revuoj en la lingvoj: ĉeĥa, greka, hungara, franca, germana, hispana, itala, japana, rumana kaj sveda.

**Dokumento pri kunlaborado kun UNESKO:** CED ĵus publikigis 14-paĝan dokumenton C/III/6 sub la titolo „Tri jaroj de konsultaj rilatoj inter UNESKO kaj UEA“. La dokumento estas publikigita en la angla lingvo kaj sendita al ĉiuj regulaj ricevantoj de la dokumentoj de CED kaj al ĉiuj Naciaj UNESKO-Komisionoj. Inter la multaj gratuloj pro la dokumento, troviĝas ankaŭ tiu de la brita pioniro s-ro M. C. Butler, kiu skribis: „Tre kore mi vin gratulas pri la du dokumentoj, kiujn mi ricevis de vi hodiaŭ matene. Ili estas tre utilaj faktoplenaj resumoj, kiuj devus helpi..... la demandanton, kiu deziras havi ĝisdatan efektivan scion pri la faktoj.“

**Kostoj de multlingveco:** CED entreprenis novan gravan laboron rilate la kostojn de multlingveco en diversaj internaciaj organizaĵoj. Estas jam kolektita tre interesa materialo. CED esperas baldaŭ publikigi eksterordinare interesajn ciferojn pri tiu demando.

**D-ro A. Bormann,** eminenta kunlaboranto de CED, publikigis gravan studon sub la titolo „Stato de la diskutado pri la problemoj de Internacia Lingvo kaj rigardo al la plua evoluo“. Interesiĝantoj bonvolu sin turni rekte al D-ro A. Bormann, Flensburg-Mürwik, Blücherstrasse 17, Germanujo.

**S-ro G. F. Makkink,** kiu jam donis kelkajn tre valorajn kontribuojn al CED, ĵus publikigis studon en la angla lingvo „Testing the Penman Formula by Means of Lysimeters“, al kiu li aldonis Esperantlingvan resumon.

## DONACOJ AL CED

Donacoj al CED	£	s	p
Stato je la 6-a de septembro 1957 . . . . .	113.10.	7	
S-ro Reto Rossetti, Britujo . . . . .	1.10.	0	
S-ino Kirsten Zacho, Danlando . . . . .	1.0.	0	
Gesinjoroj Kennedy, Britujo . . . . .	2.0.	0	
S-ro P. Bouvier, Svislando . . . . .	8.3.	2	
S-ro R. Slot, Nederlando . . . . .	0.18.	9	
S-ro R. Retault, Francujo . . . . .	0.10.	0	
S-ro R. Murray, Britujo . . . . .	1.0.	0	
S-ro A. Beck, Britujo . . . . .	0.10.	0	
S-ro G. R. Johanson, Svedujo . . . . .	0.6.	3	
S-ino J. G. Bramkamp, Nederlando . . . . .	0.4.	8	
S-ro M. Lewin, Britujo . . . . .	5.5.	0	
S-ro N. Smith, Britujo . . . . .	1.0.	0	
S-ro E. Wolfskehl, Britujo . . . . .	0.10.	0	
	£ 136.8.	5	

Al ĉiuj donacintoj plej koran dankon.



## Preslibereco kaj Presdeliktoj

La 10-an de decembro 1948 la Ĝenerala Asembleo de U.N. akceptis kaj proklamis en Parizo la Universalan Deklaracion pri la Homaj Rajtoj. Tiu grava dokumento konfirmas kaj precizigas en 30 artikoloj la fundamentajn rajtojn kaj liberecojn de la Homo, senkonsidere al liaj raso, koloro, nacieco, lingvo, sekso, religio, socia, aparteno, loĝloko aŭ kiu ajn alia distingo. Ĝi estas la ĉarto de ĉiu individuo en lia eco de Homo.

El formale-jura vidpunkto la Deklaracio havas karakteron de nedeviga rekomendo. Tamen, ĝia enhavo, en kunligo precipe kun la Ĉarto de U.N., devas esti komprenita ankaŭ kiel jure deviga. Senkonsidere al tiu demando, estas certe, ke la Deklaracio en ĉiu okazo havas grandegan moralan valoron. Tial la diskonigo de la Deklaracio, la daŭra eksplikado de ĝiaj principoj, helpas al observado de la proklamitaj liberecoj kaj rajtoj. Ju pli konsciaj estas la popoloj pri ili, des pli efike tiuj rajtoj povos esti aplikataj en la praktiko.



Unu el la grandaj Homaj Rajtoj estas la rajto je libereco de opinio kaj esprimo. \* Ĝi inkluzivas la rajton havi opinion kaj disvastigi ideojn kaj informojn per kiu ajn rimedo de komunikado senkonsidere al la limoj (art. 19).

La libereco de opinio estas interne persona rajto, dum tiu de esprimado estas natura sekvo kaj ekstera manifestiĝo de la unua. En la moderna epoko, pro la grandega progreso de la teknikaj rimedoj de informado, la libereco de esprimado ricevas ĉiam pli akcentitan karakteron de kolektiva rajto.

Hodiaŭ ĉiuj konstitucioj de la mondo formale mencias la esprimliberecon. Kelkaj rilatas al ĉiuj ĉefaj rimedoj de informado — la preso, la filmo, la radio kaj televido — dum aliaj parolas nur pri la preslibereco.

Malgraŭ tiu principa rekono de la esprimlibereco ĉie en la mondo, tamen ekzistas grandegaj diferencoj de lando al lando rilate la realigon de tiu rajto en la praktiko. Dum en unuj ĝi estas tre larĝa, en aliaj ĝi troveblas nenie krom en la konstitucia teksto.

Ĝuste pro la potenco de la rimedoj de informado, la esprimlibereco, se ĝi fakte ekzistas, starigas plurajn problemojn: Kie estas ĝiaj limoj; kiel protekti la sacion kaj la individuon kontraŭ la misuzo de tiu libereco?

En Britujo, kie la preslibereco estas parto de la

\* En la naciaj lingvoj troviĝas studoj, en kelkaj eĉ abunda literaturo, pri la Deklaracio. En Esperanto vidu la studon pri ĝi en la verko „Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo”, Rotterdam 1952.

neskribita Konstitucio, tiuj limoj estis brile difinitaj en la kazo Rex-Cuthill: ĉiu persono rajtas publikigi ĉion, kion la 12 juĝantoj-asesoroj opinios neriproĉinda, sed li devas esti punita, se li publikigas ion, kio estas riproĉinda. Fakte en Britujo, la klasika lando de la plej granda libereco de esprimado, la punoj pro la misuzo de tiu rajto estas same tiel eksterordinare grandaj.

Misuzi signifas publikigi ion, kio estas jure malpermesita. Tiurilate oni povus dividi la presdeliktojn — same kiel tiujn, kiuj estas faritaj per la aliaj rimedoj — en plurajn kategoriojn laŭ diversaj vidpunktoj. Sufiĉos, tamen, diri, ke laŭ ĉiuj juraj sistemoj publikigo de materialoj malutilantaj al la ŝtata sekureco, aŭ kontraŭaj al la publika moralo, insultoj al ĉefoj de la ŝtatoj, publika blasfemo k.s. apartenas al tiaj presdeliktoj.

Unu el la plej ĝeneralaj, plej gravaj kaj certe la plej ofta presdelikto estas ofendo kontraŭ individuo. La delikta ofendo estas tiom malnova kiom la juro. Ĝin mencias la Leĝoj de Solono kaj la 12 Tabuloj. En la moderna epoko tiu delikto ricevis apartan karakteron kaj gravecon pro la grandaj eblecoj de amasa informado. La Internacia Lingvo, kies baza ideo estas amikigo de la popoloj kaj proksimigo de la unuopuloj, povas esti uzata — kaj bedaŭrinde estis plurfoje uzata dum sia relative mallonga ekzistado — ankaŭ por tiu delikta celo. En tiuj malfeliĉaj kazoj ĝi ebligis la diskonigon de la insulto aŭ kalumnio eĉ trans la lingvajn barojn.

Ofendo en jura senco de la vorto estas ĉiu atako al honoro kaj reputacio de persono. La du ĉefaj specoj de ofendo estas insulto kaj kalumnio. Insulto estas esprimado de malrespekto sen imputado de iu ajn ago aŭ fakto al la viktimo. Tial la vereco aŭ malvereco de la imputo ne estas pruvebla. Male, kalumnio konsistas el malvera imputado de iu ago aŭ fakto, kiu atencas la honoron aŭ reputacion de la viktimo. La vereco aŭ malvereco de la imputita fakto aŭ ago estas do pruvebla, kvankam kelkaj juraj sistemoj malpermesas eĉ tion en la plimulto de la kazoj.

Preskaŭ ĉiuj juraj sistemoj distingas inter insulto kaj kalumnio, inter nepublika kaj publika ofendo, kun aparta pritrakto de la ofendo farita en presita formo. La punoj pro kalumnio estas regule pli altaj ol tiuj pro insulto. La publikaj ofendoj estas pli forte punataj ol la nepublikaj. La plej altaj punoj estas antaŭviditaj por la kulpuloj de preskalumnio.

La landoj, en kiuj regas la anglo-saksa juro, ne distingas inter insulto kaj kalumnio, nek inter nepublika kaj publika ofendo, sed ili faras gravegan



diferencon inter buŝe aŭ geste farita ofendo (*slander*), unuflanke, kaj ofendo farita per skribo, preso, bildo aŭ en kiu ajn alia daŭra maniero (*libel*), aliflanke. La dua estas konsiderata kiel multe pli grava, eĉ se temas nur pri privata letero al tria persono.

En la pliparto de landoj la presofendo estas delikto de kriminala juro. En Anglujo ĝi estas plej ofte delikto de civila juro.

La justeco postulas ne nur, ke la respondeculo estu punita, sed ankaŭ ke la viktimo ricevu kompencon pro la domaĝo suferita. Tial en ĉiu lando la viktimo povas postuli kompencon ĉu en la kadro de kriminala proceso, ĉu per aparta civila plendo. En Anglujo, diference de multaj aliaj landoj, la viktimo ne devas pruvi la domaĝon en kazo de „*libel*”, sed en ĉiu okazo ricevos kompencon, kiu kutime estas treege alta (en unu kazo el la jaro 1947 pro preskalumnio la kompenso estis 20.000 pundoj).

En la kazo de presinsulto kaj preskalumnio tre grava estas la demando kiu fakte respondecas. La afero estas solvita diversmaniere. En kelkaj landoj, ekzemple en Meksikio, unuavice estas respondeca la verkinto de la publikaĵo, kaj nur se li ne estas trovebla respondecas la direktoro, presisto, oficistoj aŭ la proprietulo de la publikaĵo. En aliaj landoj estas unuavice respondeca tiu, kiun la leĝo difinas kiel tian: redaktoro, aŭ eldonisto, aŭ presisto, aŭ proprietulo, aŭ kelkaj el tiuj, lasante al la viktimo eltrovi kaj persekuti eventuale ankaŭ la aŭtoron de la ofendo. En Anglujo estas persekuteblaj ĉiuj, kiuj en kiu ajn senco havas respondecon: la aŭtoro, redaktoro, proprietulo, presisto, kaj eĉ la agento-distribuanto. La respondeco de tiu lasta estas eksterordinare grava precipe en kazo de presajoj publikigitaj en aliaj landoj.

★

La libereco de esprimado estas unu el la bazaj ŝtonoj de demokratio. Se en iuj landoj la aspiroj kaj lukto de la popolo ankoraŭ direktiĝas al fakta havigo de tiu rajto, en aliaj landoj la ĉefa problemo estas kiamaniere efike malhelpi ĝian misuzon fare de nekonsciencaj unuopuloj. La grandaj riskoj, kiujn entenas tiu-ĉi rajto por la sekureco de la ŝtato kaj trankvilo de la civitanoj, neniel pravigas la limigon aŭ eĉ nuligon de la rajto mem. Unu el la efikaj rimedoj estas puni — eĉ tre severe, kiel tion faras la angla jura sistemo — ĉiujn misuzojn kaj tiel protekti la socion kaj la unuopulojn de tiu socia malsano.

La demokrata rajto libere esprimi sian opinion neniam signifis nek povas signifi rajton insulti kaj kalumnii. Insulto kaj kalumnio ne estas esprimo de demokratio, sed deliktoj kun radikoj en individua malico, malboneco, ĵaluzo, envio aŭ diversaj psikopatologiaj statoj, por ne paroli pri la denunca kalumnio, speciale peza tipo, kiun karakterizas ankaŭ speciale malnoblaĵaj motivoj.

Klara distingo inter la rajto kaj ĝia misuzo estas antaŭkondiĉo por protekto de la rajto kaj por kontraŭbatalado de la misuzo ankaŭ ekster la tribunalo aŭ kortumo. Ju pli sana, klera, edukita kaj konscia pri la vera signifo de tiu Homa Rajto estas iu socia medio, des pli malgrandaj estas la ŝancoj de la preskalumnio en ĝi kaj des pli facile la medio mem, sen interveno de juĝa instanco, elradikigos tiun malbonon, se ĝi tamen aperas.

La preslibereco estas unu el la grandaj akiraĵoj de la demokratio kaj nedisigebla elemento de la homa digno. Des pli energie oni devas ĉie, per ĉiuj eblaj permesitaj rimedoj, batali kontraŭ la preskalumnio kaj la aliaj presdeliktoj kiel unu el la plej grandaj sociaj malbonoj.

Prof. D-ro Ivo Lapena

## LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1957

Stato je la 31-a de oktobro 1957

### Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Usono	2016	3125	155,—
2.	Danlando	1910	2723	142,56
3.	Francujo	6575	7612	115,77
4.	Nederlando	4894	5517	112,72
5.	Italujo	3620	3970	109,66
6.	Svislando	1910	2035	106,54
7.	Jugoslavio	3563	3780	106,09
8.	Germanujo	6515	6790	104,22
9.	Hispanujo	2092	2170	103,72
10.	Finnlando	2687	2765	102,90
11.	Brazilo	6985	6927	99,17
12.	Svedujo	6895	6805	98,69
13.	Belgujo	1952	1890	96,82
14.	Norvegujo	2113	2019	95,55
15.	Britujo	7351	6955	94,61

### Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Aŭstralio	1025	1218	118,82
2.	Argentino	745	805	108,05
3.	Aŭstrujo	1400	1505	107,50
4.	Japanujo	1210	1280	105,78
5.	Novzelando	942	935	99,26
6.	Sudafriko	230	225	97,83
7.	Portugalujo	580	560	96,55
8.	Urugvajo	325	290	89,23
9.	Kanado	500	440	88,—
10.	Izraelo	290	240	82,76
11.	Islando	405	295	72,84
12.	Maroko	1061	538	50,70

### Redakteia Noto

Pro la decido aperigi la aldonon BELARTO dum 1958, la pliparto de la prokrastita materialo tie trovos sian lokon. Tial ni estas liberaj akcepti denove tre limigitan kvanton da materialo (artikoletoj k.s.). Tamen ni atentigas niajn kontribuantojn, ke nia spaco estas severe limigita, kaj sekve ni povas aperigi nur malgrandan kvanton de tio, kion ni ricevas.



# TRA LA MONDO

• **UNO** eldonis esperantlingvan afiŝon. Dank' al komunaj klopodoj de niaj usonaj geamikoj, Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko, kaj UEA, ĵus estas eldonita afiŝo kun esperantlingva teksto, memoriganta la Tagon de Unuiĝintaj Nacioj. Ĝi estas oficiala eldono de Unuiĝintaj Nacioj, Grupoj kaj individuoj, kiuj povas efike utiligi tiun afiŝon, povas ĝin ricevi de la C.O. de UEA. Sendu nur unu respondkuponon por 5 afiŝoj.

• „Pola Esperantisto” denove en presata formo. Post naŭjara intermito, dum kiu la oficiala organo de la Asocio de Esperantistoj en Pollando povis aperi nur multobligite, la septembra-oktobra numero denove aperis presite sur 16 grandformataj paĝoj kun alloga kovrilo kaj interesa enhavo. Ni ĝoje bonvenigas ĝin.

• **Esperantistoj partoprenis Pax Christi-kongreson.** Ĉe la 5a Internacia Kongreso de Pax Christi, la oficiala katolika pac-movado, en Mariazell, Aŭstrujo, inter la pli ol 400 partoprenantoj troviĝis proksimume 20 esperantistoj. La kongreslingvoj estis nur la germana kaj la franca. Interalie oni pri-traktis „Internaciajn Interŝanĝojn”, kaj proponis aferojn — interŝanĝon de personoj, feriestadojn translandajn, korespondadon, gazetinterŝanĝon, ktp — de ni esperantistoj jam delonge sukcese praktikatajn. En la diskuto partoprenis niaj samideanoj prof. Mielert, Munkeno, kaj d-ro Halbedl, Knittelfeld, trafe menciante Esperanton kaj ĝian praktikan valoron. La esperantlingva saluttelegramo de IKUE-prezidanto prof. parohestro Beckers estis laŭtelegata unue en la esperanta originalo, poste en germana kaj franca tradukoj.

• **Novaj kursoj inter munhenaj katolikoj.** Maksimiliano Maria Mielert, vic-prezidanto de Germana Ligo de IKUE, post referato en la „Katolika Poredukista Ligo, Munĥeno” pri la temo „Esperanto nuntempe en la mondo kaj kiel tagpostulaĵo por la lernejoj” povis komenci kurson kun 50 geinstruistoj, inter ili multe da fratulinaj el la „Ordeno de la Malriĉaj Lernejofratulinaj”. Duan kurson kun 25 fratulinaj el la „Ordeno de la Anglaj Fratulinaj” povis komenci sam-ino Rabe. La ambaŭflankaj orden-superulinaj intencas instigi la eksterlandajn ordendomojn por ke ankaŭ ili lernu resp. instru Esperanton por plifaciligi la reciprokajn rilatojn. Komenciĝis krome kurso por 35 liceaninoj. La partoprenantinoj poste aliĝos kiel la unuaj en nia urbo al la junularrondo „Grajnoj en Vento”.

• **Esperanto en Germana Demokratia Respubliko.** En n-ro 95 de la „Presse der Sowjetunion”, eldonata de la gazetaroficejo de la ministro-prezidanto de

G.D.R., aperis artikolo de la soveta prof. Bokarev pri „Esperanto — ĉu hodiaŭ ankoraŭ aktuala?” La aŭtoro kontraŭdiris la ofte aŭditajn frazojn de „kosmopolitisma afero”, „artefarita lingvo”, ktp, kaj montras klare kiel bone Esperanto povas servi al la homaro. La artikolon jam reprenis diversaj gazetoj, kiel ekzemple „Union” (Dresden), „Sonntag”, „Nowa Deba”, kaj aliaj. Ankaŭ en aliaj gazetoj aperis favoraj artikoloj, kiel ekzemple en la gazeto de la germana packomitato „Rund um die Welt” (Ĉirkaŭ la mondo). La germana demokrata radiostacio Berlin volas subteni nian aferon kaj jam sin turnis al la superaj instancoj.

• **Festo kaj ekspozicio en Skövde.** La Esperanto-klubo en Skövde, Svedujo, festis sian 25-jaran ekzistadon per jubilea festo kaj ekspozicio komence de oktobro. La ekspozicion, kiu montris ne nur Esperanton sed ankaŭ iom pri la laboro de UNO kaj UNESCO (tre efika kunlaboro!), la klubo aranĝis en la urba studdomo.

• **Kurso en nederlanda ĵurnalo.** Denove ekaperis Esperanto-kurso en la nederlanda ĵurnalo „De Typhoon” en Zaandam. Dum 26 semajnoj la redakcio disponigos spacon al la esperantistaro por aperigi lecionojn. Eksterlandanoj estas invitataj, skribi gratulon, kaj peti korespondadon kun iu el la lernantoj, al: Postkesto 101, Zaandam, Nederlando.

• **50-jara jubileo de Komuna Konversacia Klubo.** Sabaton la 4an de januaro, K.E.K. (Kopenhago, Danlando), la konataj eldonoj de la KOKO-serio de libroj, festos sian 50-jaran ekziston.

• **Traduko el Esperanto.** En „Thjodviljinn”, populara islanda ĵurnalo, aperis la 20an de oktobro 1957 islanda traduko de la unua ĉapitro de „La Infana Raso”, epopea poemo de William Auld. La brilan tradukon faris Baldur Ragnarsson, kiu ĝisdate tradukis 4 el la 25 ĉapitroj de la verko. Antaŭnelonge la 22a ĉapitro aperis islandlingve en „Birtingur” (Reykjavik).

• **Esperanto en la Universitato de Sankta Paŭlo.** Laŭ decido de la Rektoro de la Universitato de Sankta Paŭlo (Brazilo), oni kreis en la Fakultato de Filozofio, Sciencoj kaj Beletristiko de tiu universitato kurson de Esperanto gvidatan de Interfrata Esperanto-Klubo, kiu jam komencis la instruadon en oktobro 1957.

• **Guberniestro salutas Esperanto-kongreson.** La guberniestro de la ŝtato Sankta Katerino (Brazilo) sendis oficialan salutleteron al la XVa Brazila Kongreso de Esperanto. Oni laŭtelegis ĝin dum la solena malfermo en la Palaco Itamarati, sidejo de la Ministrejo por Eksteraj Rilatoj, sub la prezido de Ministro Macedo Soares.

• **Novaj Esperanto-stratoj en Hungarujo.** En Hungarujo oni inaŭguris en urbo Szeged okaze de la VIa Sudhungarlanda Esperanto-Renkontiĝo straton

Esperanto, kun memortabuleto pri Zamenhof, kiun oficiale transprenis la prezidanto de la urba konsilantaro, s-ano Imre Tombácz, parolante en Esperanto. En urbo Miskolc, okaze de Nordhungarlanda Esperanto-Kunveno, oni inaŭguris placon Esperanto kun memortabulo pri la 70-jara jubileo de nia lingvo. En montaro Pilis, nordokcidente de Budapeŝto, oni inaŭguris Esperanto-Fonto-nomtabulon. La nomo troviĝas sur ĉiuj turismaj mapoj.

• **Reprezentanto de ILEI ĉe Monda Konferenco de Instruistoj.** Reprezentanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj estis invitita de F.I.S.E. ĉeesti la Mondan Konferencon de Instruistoj en Varsovio de 20.VIII ĝis 27.VIII 1957. S-ro Josef Toczyski (Gdansk) estis komisiita. Li tuj organizis malgrandan ekspozicion, kaj disdonis inter ĉiuj partoprenantoj la seslingvan informilon de UEA. Des pli aktuala estis la afero, ĉar la Konferenco spertis sufiĉe grandajn malfacilaĵojn lingvajn. La trian tagon s-ro Toczyski alparolis la Konferencon kiel observanto de ILEI, transdonis la salutojn de la esperantista instruistaro, kaj legis la rezolucion faritan en la instruista kunveno ĉe la 42a U.K. En sekva parolado li substrekis, ke ĉe la Varsovia Konferenco estas reprezentantoj de pli ol 50 nacioj kaj multaj organizaĵoj kaj asocioj internaciaj. La lingvoj de la konferenco estas ses (pola, franca, angla, germana, hispana kaj rusa). En Marseille estis reprezentitaj ne malpli da nacioj, sed necesis nur unu lingvo, Esperanto, kiu vekis neniam malamojn — lingvo ideale neŭtrala, vere demokrata, ligita kun nenia nacia soviniŝmo kaj nenia imperialiŝmo. La parolado estis akceptita per aplaŭdego.

• **La 28a Itala Kongreso de Esperanto okazis en Varese de la 21a ĝis la 25a de septembro.** Partoprenis proksimume 400 samideanoj, el kiuj 50 venis de eksterlando.

• **Oni kolektas historian materialon pri Esperanto-movado en Litovio.** Por ke ne perdiĝu definitive multaj detaloj pri la Esperanto-movado en Litovio, oni pretigis ĉirkuleran demandaron kaj sendis ĝin al ĉiuj enlandaj samideanoj. El la respondoj estos eble kompili historion de la movado en tiu lando. Respondecaj: Petrus Juozas, Istorietnografia muzeo de Akademio de Sciencoj, Gorkio 11, VILNIUS, Litovia SSR.

• **Fotobildkartoj el Ĉeĥoslovakio.** Esperantistoj en Praha lastatempe eldonis du seriojn de fotobildkartoj kun esperanta teksto. La serioj enhavas po 12 bildojn.

• **Jubilea afiŝo.** Okaze de la 70-jara datreveno de Esperanto kaj de la 50-jara datreveno de Bulgara Esperanto-Asocio, la bulgara asocio eldonis belan grandformatan festafiŝon.

• **Norvega Vojaĝtrafika Asocio eldonas filmon kaj broŝuron en Esperanto.** La Vojaĝtrafika Asocio por Oslo kaj



ĉirkaŭajo pasintomere pretigis esperantlingvan kopion de sia turistfilmo „Bonvenon al Oslo“. Ĝi estos baldaŭ je dispono por la esperantistaj organizaĵoj, kiuj povas peti ĝin de Norvega Esperanto-Ligo, Box 942, Oslo, Norvegujo. Ĉe la sama adreso estas mendebila samtempe eldonita turistbroŝuro, en formo de manskribita letereto.

• **Esperanto en la gazetaro.** En *Publicações Farmacêuticas* (Rio de Janeiro), s-ro Cicero Pimentel, en artikolo „O Esperanto e a Terminologia Quimico-Farmacêutica“, proponas la uzadon de Esperanto kiel lingvo internacia en la hemi-farmacia terminaro. La sama samideano sukcesis aperigi en „*Revista de Química Industrial*“ ankaŭ artikolon „O Esperanto, e a literatura técnica e científica de química“. Ankaŭ en Brazilo, la revuo *Novo horizonte*, en sia numero de junio 1957, dediĉis kvin paĝojn en Esperanto al Allan Kardec, kies verkoj estas konataj al la esperantistoj per esperantaj tradukoj. Brazila ĵurnalo *Folha da Manhã* (Sao Paulo) raportis pri vizito de esperantistoj al la Ministro de Edukado okaze de la 15a Brazila Esperanto Kongreso. Kaj nun Pollando: en granda semajna revuo *Kulisy* (eldonnumero 252,000) de 15 septembro aperis ampleksa artikolo „Bierzmy sie do Esperanto“ (Ellernu Esperanton) de Mag. phil. Mieczyslaw Zgorzewski, Wroclaw. La gazeto *Ilustrowany Kurier Polski* estas tre favora al nia afero, kaj ĉiusemajne aperigas informojn kaj artikoletojn — tiel multnombrajn, ke ne eblas ilin listigi ĉi tie. Portugalujo: la gazeto *República* (Lisbono) regule aperigas la efikajn artikolojn de nia samideano Saldanha Carreira, sub rubriko „Crónica Esperantista“. Aparte ampleksan spacon ĝi dediĉis al la 42a U.K. Ankaŭ en Hungarujo ne mankas informoj en la gazetaro. La oficiala revuo de la Federacio de Demokrata Mondjunularo *Világ Ifjusága* aperigis kvarfoje tutpaĝajn lecionojn de s-ano L. Márton. La gazeto *Népszabadság* aperigis artikolon pri jubileo de Esperanto, kun bildo de Zamenhof. Kun artikolo pri abelbredista kongreso en Clermont, La *Liberté* (Francujo) publikigis bildon pri la stando de la esperantistaj abelbredistoj, kun favora komento.

## VALENCIO SUB DILUVO KAJ INUNDO

Valencio, la mediteranea urbo, kun pli ol duonmiliono da loĝantoj, kie troviĝas la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio, suferis — lunde, 14a de Oktobro — la plej teruran katastrofon de sia tuta historio. Pro efiko de apoteoza pluvego, vera rekordo en Eŭropo — 852 litroj por ĉiu metro kvadrata! — la kutime trankvila rivero Turia elbordiĝis kaj lavange inundis multajn centojn da kvadrataj kilometroj kaj la urbo mem, disportante detruon, pereon kaj morton.

Tiel forta estis la impeto de la alfluo,

ke en furioza ondato la rivero penetris, englutinte ĉion, eĉ en la urbocentron. Oni povas diri, ke krom pli ol tricent domoj plene detruitaj, precipe en maldestaj kvartaloj, neniu konstruaĵo — sekve, neniu hejmo — restis sen difektiĝo. Nia urbo, ordinare gaja, bela kaj pura, dolorige impresas nun — post unu semajno — sub dika tavolo da koto kaj ŝlimo, kio multe malhelpas kaj malfaciligas la pezajn laborojn por restarigi la normalecon en plej urĝaj servoj. La nombro da viktimoj ŝajne alproksimiĝas al la dua milo, kaj la materiajn damaĝojn oni taksas je pli ol dekmil milionoj da pesetoj (proks. 200 milionoj da dolaroj). Tre dankinda estas la tuja oportuna helpo de ĉiuj najbaraj provincoj kaj la kortuŝa solidareco de la tuta lando kaj de la tuta mondo, kies ĉefaj radiostacioj — eĉ tiu malproksima de Pekino — elsendis kondolencajn vortojn. La valencianoj emocie dankas tion, konstatinte, ke bonvolaj humanecaj sentoj fendas kaj ŝiras ĉiuspecajn politikajn kurtezojn...

Ankaŭ la valenciaj esperantistoj ricevas jam multe da leteroj kaj poŝtkartoj de eksterlandaj geamikoj, al kiuj komisiite mi deziras sciigi, pere de ĉi tiuj rapide skribitaj linioj, ke malgraŭ la intenseco de la ĵus okazinta kataklismo, neniu urba esperantisto perdis la vivon nek suferis gravajn perdojn en sia havaĵo, almenaŭ ĝis plej lastaj informoj en la Federacia sekretariejo.

Je nomo de la valencia esperantistaro,

Luis Hernández  
Redaktoro de Boletín

## La jubilea festo de Austria Esperantista federacio pro la 70-jara ekzisto de Esperanto en Knittelfeld

La festo bonege sukcesis. Ĝi okazis de la 7-a ĝis la 9-a de septembro 1957. Ĝi estis inda kaj digna kadro de l'inaŭguro de ESPERANTO-Strato en Knittelfeld, kiu viciĝis inter la ankoraŭ malmultaj lokoj de la tero kun tia aŭ simila honoro al nia Majstro kaj ties verko. Malgraŭ la



Ĉi tie la vicurbestro malkovras la novan nontabulon.

malfavora tempo, pro la komenciĝo de l'oficiala instruado en la elementaj kaj mezgradaj lernejoj de nia ŝtato, la partopreno estis tre kontentiga. Protektis la aŭstra instruministro, la registarestro de la lando Stirio, la ĝeneraldirektoro de la aŭstruja federacia fervojararo. Ĉeestis ankaŭ ĝesamideanoj el kvin aliaj landoj, kiuj kun la enlandaj el ĉiuj liglandoj de Aŭstrujo ĝuis la elokventan argumentadon de la festoratoro d-ro Karl Friedl el Graz, kiu kiel direktoro de la Stiria Landbiblioteko ankaŭ instalas vizitindan E-ekspozicion helpate de AEF, kaj la prezentadon de aŭskultindaj kantaĵoj, gajaj unuaktaĵoj de nia junulara taĉmento konsistanta ankaŭ el plaĉegaj infanoj 3½-12 jaraĝaj, kiuj ĉiuj senproĉe parolis nian lingvon. La ĉeestintaj aŭtoritatuloj estis bone impresitaj. La ornamigo de la tuta urbo per flagoj estis preskaŭ kompleta, kion ĝin nun neniu organizaĵo spertis. La vetero dum la festo estis, post kaj antaŭ frostiga pluvado, belega. Prezidis la del. de UEA D-ro Halbedl kiel landestro de AEF en Stirio.

## RIDET

Fondiĝis RIDET: Rondo Internacia De Esperantistoj-Tradukistoj, kun interesa nova ideo. Konstatinte, ke multaj esperantistoj havas sufiĉan sperton kaj kapablon por fari bonajn tradukojn, sed ke iliaj verkaĵoj ofte restas en la tirkestoj, oni decidis inviti ilian kunlaboron por eldoni multobligitajn kajorojn, kies publiko estu la rondanoj mem kaj tiuj, al kiuj ili donacu ekzemplerojn de la kajoroj. Per RIDET tiaj verkemuloj havas kontakton kun aliaj tradukantoj; tio stimulas ilin al plua laboro, kaj la rimarkigoj de la legantoj kaj regula legado de tradukoj de aliaj rondanoj evoluigas la kapablon de la kunlaborantoj. Oni akceptas ankaŭ originalaĵojn por la kajoroj. Interesiĝantoj pri tiu bona ideo estas petataj sin turni al: S-ro Jan M. J. Driesen, Sam. Mullerstr. 7a, ROTTERDAM-WEST, Nederlando.

## Alvoko al Agronomoj Esperantistoj

Formiĝis scienca kaj profesia fakorganizo de agronomoj-esperantistoj, kaj aperis la unua numero de Agronomia Fakbulteno, „La Kulturita Planto“. Membro-abonanto rajtas esti ĉiu persono, kiu diplomiĝis de agronomia supera instituto, fakultato aŭ akademio samranga, kiu parolas kaj uzas la Internacian Lingvon Esperanto en sia scienca laboro kaj praktiko. Membro-subtenanto povas esti ĉiu esperantisto, kiu estas studento de agronomio, ĝardenistoj, terkulturistoj, abelistoj, botanikistoj, k.a. Interesatoj skribu al: Ĉef-agronomo Sterjo Z. Kukusev, M.T.S. P-kesto n-ro 1, BELOZEM, Dep. Plovdiv-2, Bulgarujo.

Partoprenu konkurson MS:  
fariĝu MS kaj gajnu premion!



# DUOBLA TRADUKO

# ŜAKA RUBRIKO

Gvidas: Dro V. Faigl, Zlonice,

Ĉeĥoslovakio

Antaŭ nelonge alvenis el Tokio al Praha japana traduko de „Avinjo“ de Bozena Nemcová, ĉefverko de ĉeĥa klasika literaturo. La tradukinto, japana verkisto kaj poeto Kei Kurisu, apogis sin dum sia laboro sur la Esperanto-teksto de tiu verko, preparita de Tobek kaj Procházka kaj helpis lin la esperantistoj Ginz kaj Krousky. En la bela 400-paĝa, riĉe ilustrita volumo estas tiuj ĉi faktaj notitaj.

Eminenta ĉeĥa poetino Marie Pujmanova verkis post sia reveno el Ĉinujo poemkolekton „Ĉina rideto“. Tiu libro aperis nun en Ŝangĥaj en ĉina traduko. La tradukinto Li-Laojon el Tientsin diras en la libro, ke li enĉinigiĝis ĝin laŭ Esperanto-traduko de Ota Ginz.

Al la 90-jara naskiĝtago de la granda ĉeĥa poeto Petr Bezruč oni prezentos liajn poemojn en japana kaj ĉina tradukoj, preparitaj laŭ sama maniero.

Jen nur lastatempa rikolto el konsiderinda vico da similaj eldonaĵoj.

Ŝajne prave oni povus refuti ĝustecon de tia agado, ĉar duobla traduko ne povas multon valori. /Vidu ankaŭ „Heroldon“ nro 12-a - „Ankorau unu semo“. La kunlaborintoj en tiuj tradukoj tamen ne konsentas. Kontrolis iliajn laborojn elstaraj fakuloj de orientaj lingvoj kaj ili konfirmas ne nur absolutan fidelecon, sed ankaŭ konservon de ĉiuj stilaj specialaĵoj, de nuancoj kaj ĉarmoj enestintaj en la originalo. Ili povis atingi tiujn rezultojn, ĉar ĉiuj el ili laboris pri sia lingvo ĝepatra, bone de ili posedata. Dua lingvo estis Esperanto, kiu ili ambaŭ komplete majstris.

Tiu ĉi absoluta posedo de pluraj lingvoj naciaj estas malofte atingata, se temas pri lingvoj tre diferencaj. Dro Bartušek, lektoro de ĉina lingvo en Praha, prezentis en publika parolado kiel sukceson, ke kelkaj ĉinaj studentoj post pluraj jaroj da lerno de ĉeĥa lingvo faris „tute tolereblan“ tradukon de unu el la plej simplaj ĉeĥaj popolkantetoj. Kaj ni citu ĉi tie juĝon de ĉeĥa literatura revuo ĉeĥa „Literární noviny“, nro 29-a, laŭ kiu la ĉina sciencisto Djung-tii-ju, asistento de la katedro de ĉeĥa lingvo de la universitato en Pekingo, verkis ĉinan lernolibron de ĉeĥa lingvo kaj oni aldonas la rekomendon, ke iu ĉeĥo kontrolu la eventualan novan eldonon. La artikolo daŭrigas, ke la sama Djung-tii-ju tradukis kelkajn ĉeĥajn poemojn senpere el ĉeĥa lingvo.

Ni kuraĝas iom dubi pri perfekteco de tiuj tradukoj kaj ni estas konvinkitaj, ke ne estas forlasota, sed ĉiam pli vaste uzota, helpo de Esperanto, kiu por tiu ĉi speciala celo denove montrigis neanstataŭebla instrumento.

O. G.

## Partio Nro 1 - Sicilia

Ni alportas tre interesan partion el majstreco de Jugoslavio, ludita inter

Blanko: Janosevic

Nigro: Udovčić

- |             |        |
|-------------|--------|
| 1. e2-e4,   | c7-c5  |
| 2. Ĉg1-f3,  | d7-d6  |
| 3. d2-d4,   | c5xd4  |
| 4. Ĉf3xd4,  | Ĉg8-f6 |
| 5. Ĉb1-c3,  | a7-a6  |
| 6. Kc1-g5,  | e7-e6  |
| 7. Kf1-e4,  | Kf8-e7 |
| 8. Kc4-b3,  | Ĉb8-c6 |
| 9. 0-0,     | Kc8-d7 |
| 10. Rg1-h1, | 0-0    |
| 11. f2-f4,  | h7-h6  |
| 12. Kg5-h4, | Ĉf6xe4 |
| 13. Kh4xe7, | Ĉe4xc3 |
| 14. Ĉd4xc6, | Kd7xc6 |
| 15. Dd1xd6, | Dd8xd6 |
| 16. Ke7xd6, | Tf8-d8 |

17. Kd6-e5 Se blanko supozus, kio sekvos, li certe trovus la solan ĝustan movon Kc5 ..... Td8-d2! Kiel fulmo el klara ĉielo. Ĉevalo c3 estas netuŝebla pro minaco Txg2. 19. h4, Txc2† ktp. kaj nigro gajnas figuron reen kaj restos al li tri peonoj pli multe. Se blanka kuriero starus sur c5, blanko povus defendi sin per Tf2, ĉar nun ne eblas Tad8 pro 19. bxc3, Td1†, 20. Tf1, T8d2, 21. Tfxd1, Txg2, 22. h4! kaj blanko gajnos.

18. Tf1-g1, Ĉc3-e2 19. Tg1-d1 Tio estas necesa, ĉar post 19. Tel, h5! 20. Tad1, Tad8, 21. Txd2, Txd2, 22. c4, h4, 23. Td1, h3 nigro matigas. Se blanko ludos 20. Kc4 / aŭ ankaŭ 22. Kc4 / do post Ĉd4 li perdas ĉiam minimume peonon. .... Ta8-d8 20. c2-c3 Post ŝajne pli bona 20. c4 estas tre malagrabla f6!, ekzemple 21. Kc3, Ĉxc3, 22. bxc3, Kxg2†!, 23. Rg1, Kh3 kaj nigro certe gajnos. ... h6-h5! La peono marŝas nehaltigeble sur h3, ĉar blanko ne povas ludi h3, ĉiam pro Ĉg3† kun sekvonta Txg2† ktp.

21. Td1xd2, Td8xd2 22. Ta1-d1 kaj ree blanko forspiris firme konvinkita, ke nigro devas ŝanĝi, ĉar ne eblas preni sur b2 pro c4 kaj turo ne povus retiriĝi. Td2xb2! 23. c3-c4, h5-h4. Tio kronas tutan kombinadon. Blanko ne povas fari ion alian ol preni. 24. Ke5x b2, h4-h3, 25. Td1-d8† ... En malespera situacio blanko ankoraŭ trovis defendon. Klare malgajnigis 25. Tg1, Ĉxf4 kun sekvonta hxg2† kaj al nigro restos pli je du peonoj. ... Rg8-h7, 26. Kb3-c2†, f7-f5. La sola defendo. Je g6 aŭ Rh6 sekvas Th8 mato.

27. Td8-d5! Tio estis plano de defendo. Redonas materialon kaj se nigro prenos exd5† sekvas 28. cxd5, Kxd5, 29. Kxf5†, Rh8 30. Kxh3, Ĉxf4, 31. Rg1, Ĉxh3†, 32. gxh3, Kxa2 kaj pro malsa-

maj kurieroj estas espero teni remison. .... g7-g6! Senkompata. Blanka reĝo ne povas eliri el mata reto. 28. Kc2-e4 Vere malespere. Blanko penas liberigi la cirkolon antaŭ reĝo. .... e6xd5!


Li trarigardis insidon. Je fxe4?, 29. Td8 restas nenio alia ol hxg2†, 30. Rxg2, Ĉxf4† 31. Rf1, Rh6 ktp. kaj blanko havas tamen esperon teni la partion.

29. c4xd5, f5xc4, 30. d5xc6, b7xc6 31. g2xh3 Malfeliĉe ne eblas 31. g3 pro nehaltigebla antaŭteno de peono c. .... Ĉe2xf4, 32. Kb2-c1, Ĉf4-d3 33. Kc1-d2, c6-c5 34. Rh1-g2, Ĉd3-b4 35. a2-a4, Ĉb4-d5 36. Kd2-g5, c5-c4 37. h3-h4, Rh7-g7 38. Rg2-g3, Rg7-f7 39. Rg3-g4, Rf7-e6 40. h4-h5, g6xh5† kaj blanko rezignis, ne interrompinte la partion, ĉar li konvinkigis, ke post 41. Rxh5, e3 unu el peonoj nehaltigeble promocios. Bela partio, kiun ĉiu ĝoje traludos.

/ Laŭ rimarkigoj de m.J.Rejfir el Cs. Sach /

## Problemo Nro 2

Originalo por „Esperanto“. Helmut Rössler, St. Martin, Germanio.



### MATO EN DU MOVOJ

Kontrolo: Bl.: Rb2, Ta4, Te7, Kb6, Ĉc4, Ĉd3 p.: c5, e2, f3 Ni.: Rd4, Kd6, Ĉe6, p. e3.

Solvajn sendu ĝis 31.3.1958 al gvidanto de la rubriko.

Al nia problemo Nro 1: Pro eraro elfalis informo, ke temas pri MATO EN DU MOVOJ. / Kontrolo: Bl.: Rh1, Td7, Tf1, Ka2, Kg1, Ĉd4, Ĉh7, p.: b2, g5, h3, h4 Ni.: Re5, Ĉe3, Ĉf3, p.: d5, e4.

Realigŭ tuj por 1958

kaj

altigu vian

kategorion!



# KORESPONDA SERVO MONDSKALA

*Oficiale Servo de U.E.A.*

**K.S.M. Bezonas nepre fidindajn adresojn.**

Tial mi petas la legantojn atenti la jenajn konsilojn. Tiamaniere ili helpos min starigi grandan adresaron (sub formo de zorge ordigita sliparo) de ĉiuj korespondemaj esperantistoj, kiu estos ĉiam pli universala, pli „mondskala“, sekve tre utila al ĉiuj.

**1) Ĉiuj korespondemuloj disponigu al K.S.M. la jenajn informojn pri si mem:**

- antaŭnomo kaj familia nomo
- aĝo
- ĉu edz(in)iĝinta aŭ ne
- kompleta adreso
- profesio
- ĉu filatelisto aŭ ne
- en kiuj landoj (almenaŭ 5) vi akceptus korespondantojn?
- kun kiom da korespondantoj vi konsentus interrilatiĝi?

Al tiu demando vi povas respondi per nura poŝtkarto, en la ĉi supre indikita ordo, sed — mi petas vin — simpligu mian laboron ne skribante longajn leterojn! Por ĉiu samideano doninta pri si mem la ok informojn de la demando, mi faros apartan slipon utiligotan laŭ la petoj, kiujn mi ricevos. Antaŭan dankon al ĉiu disponigonto!

**2) Ĉiuj personoj jam skribintaj al K.S.M.,** kiuj (jam havante sufiĉe da korespondantoj) intencas ne alpreni novajn, bonvolu skribi al mi por peti, ke mi forprenu iliajn slipojn el la adresaro. Sed ĉiuj, kiuj ne faros tion, bonvolu nepre respondi al tiuj, kiuj skribos al ili nome de K.S.M.

**3) Ĉiam sendu kompletajn informojn,** laŭ la ok punktoj de la ĉi supra demando. Tion faru por vi mem, por amikoj (por kiuj vi petas adreson de korespondanto), aŭ por lernantoj viaj (kun detalaj informoj por ĉiu el ili!) Estas ja necese scii, ĉu vi (aŭ ili) bone konformas al la personoj, kun kiuj mi vin (aŭ ilin) interrilatigos!

**4) La punktoj g) kaj h) de la demando** estas tre gravaj por la bona efiko de K.S.M. Al la demando: g) respondu ĉiam per almenaŭ 5 landonomoj, eĉ se vi deziras nur unu korespondanton kaj envicigu ilin laŭ preferordo. Al la demando: h) respondu per la nombro de eventuale akceptotaj korespondantoj. Tiu respondo indikos al mi, ĝis kiom da fojoj mi povos transdoni vian adreson al alilandaj petantoj.

**5) Esperanto-instruantoj** sendu ja adresojn de siaj gelernantoj (kun ĉiuj informoj) kaj eĉ multajn se eble, sed nur de korespondopretaj lernantoj, kiuj certe respondos, ĉar ĉiu adreso devas esti fidinda! Instruantoj dezirantaj korespondigi siajn gekursanojn petu de mi

specialajn foliojn.

Nun, se vi deziras mendi adreson de korespondemulo, ne forgesu doni ankaŭ pri vi mem ĉiujn utilajn informojn (vidu ĉe 1)) kaj aldoni internacian respondokuponon por ĉiu petata korespondanto. Se ne, vi ne ricevos rektan respondon de mi. Mendon por tuja ricevo de korespondadreso kaj disponigon de sia propra adreso oni kompreneble povas kombini. Bonvolu adresi ĉiujn korespondantojn pri K.S.M. al tiu ĉi nura adreso:

**DANIEL LUEZ**  
LAON (Aisne), Francujo

UEA estas NI  
ĉiuj!

Nia celo estas la  
disvastigo de  
nia lingvo.

Realigu tuj!

## RADIO

		Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.
		En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.
		<i>Mallongigoj:</i> I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.
<b>Dimanĉo</b>	10.17—10.30	Rio de Janeiro, 30.78m. 25.48m. K.I., L.B.V., Av. Rio Branco 43-3º-Rio de Janeiro (D.F.) Brazilo.
	14.00-14.15	Piraĉununga, 198m. K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraĉununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00—19.25	Sofia, 49.42m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30—22.55	Sofia, 39.11m, 30.93m. P.
	23.20-23.35	Bilbao. 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo variebla dum unuhora diverslingva programo.)
<b>Lundo</b>	17.30—17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 16.87m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	18.10—18.30	Valencia, 233m, P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 402m. P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
<b>Mardo</b>	00.45-01.00	San José. 192m. P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo.
	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, 11.70m. P. (D-ro Baur).
	15.00-15.10	Ljubljana. 327m, 221m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m, 41.24m, 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
	19.00-19.15	Stockholm. 33.60m., 26.50m., 19.90m. P. Radio I.B.R.A., Esperanto programo. Poŝtako 822, Stockholm 1, Svedujo (nur la lastan mardon de ĉiu monato).
<b>Merkredo</b>	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.55-22.05	Wien. 208m, 48.74m, 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.50-23.00	Hilversum, 298m, I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.
<b>Ĵaŭdo</b>	08.30-08.45	Paris. 348m, 249m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat.)
	23.05-23.20	Zagreb. 264m. P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	Sao Paulo, 62.83m. I.K. Rádio Progresso. Sao Paulo, Brazilo.
<b>Vendredo</b>	00.45-01.00	San José. Kiel marde.
	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat.)
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 470m, 197m, 47m, 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala. Mez-Ameriko.
<b>Sabato</b>		Rio de Janeiro, 214m. K. Radio Roquette Pinto PRDS, da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	21.00—21.30	Rio de Janeiro, 214m. K. Radio Roquette Pinto PRDS, Rio de Janeiro, Brazilo.
	22.15-22.22	Hilversum, 402m, P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

**Radio Roma, 3-XII,** Itala urbo Lucca; **6-XII,** Decembro; **10-XII,** Insulo Capri; **13-XII,** Leterkesto kaj bibliografio; **17-XII,** Novajoj el Italujo; **20-XII,** La Sanktulino de la Elmigrantoj Francesca Saverio Cabrini; **24-XII,** Revenas Kristnasko; **27-XII,** Dandandoj mokataj (novelo de Bandello); **31-XII,** Jaro finiĝis. Krome, ĉiun merkredon, Kuriero de Esperanto. Prelegantoj: D-ro Vincenzo Musella kaj S-ro Luigi Minnaja.



# MAINZ

La ĉefurbo kaj Universitata centro de Rejnlando, Mainz, kuŝas ĉe la turniĝo de la Rejno, vid-al-vide al la enfluo de la Mainrivero.

La belecon de la situo Goethe jam tre laŭdis; li skribis: „la rigardo de la Rejno kaj de la ĉirkaŭaĵo estas io unike bela“. Tiu ĉi situo influis ankaŭ la historion de la urbo. Mainz estas, kiel la studoj pruvis, ne nur unu el la plej malnovaj kolonioj sur germana teritorio entute, sed unu el la malmultaj lokoj, kie de antaŭ la nova ŝtonepoko seninterrompe loĝis homoj. Sur la altaĵoj en la Rejnangulo oni trovis postsignojn de bivakloj de ĉasistoj ŝtonepokaj. La keltoj donis al Mainz ĝian nomon; la latina signifo de la hodiaŭa Mainz, „Mogontiacum“, enhavas la nomon de la kelta lumdio Mogo. La romanoj konstruis ĉi tie en la lasta antaŭkrista jarcento grandan fortifikacion, ĉirkaŭ kiu disvolviĝis baldaŭ burĝa urbo, kiu fariĝis komerca kaj industria centro. Oni diras, ke la romana Mainz nombris pli ol 20.000 loĝantojn. La romanoj jam konstruis tie ĉi stabilan ponton trans la Rejno, kiu estis poste renovigita de la imperiestro Karolo la Granda. Bedaŭrinde la konstruaĵo estis detruita de brulego. La unua ĉefepiskopo de Mainz estis Bonifatius, kiu de ĉi tie ebligis la aliron de Germanujo al kristaneco kaj per ĝi al okcidenta kulturo. Poste, la ĉefepiskopoj de Mainz estis ankaŭ ĉefkancelieroj de la Sankta Romana Imperio Germana Nacio. Reĝoj esti kronataj tie ĉi kaj famaj regnaj parlamentaj kunsidoj okazis. La plej konata el ili estas tiu de imperiestro Barbarossa. Por la pompo kaj la graveco de la mezepoka Mainz atestas ankoraŭ hodiaŭ la impona Martinsdom (Katedralo, konsekrita al la sanktulo Martino), kies konstruado komencis la ĉefepiskopo Willigis en la jaro 975. En la komenco de la moderna epoko la Mainza Johannes Gutenberg inventis la presarton kaj per tio li faris sian patruurban elirpunkto de nova evoluo por la homa kulturo. Tiam estis fondita ankaŭ la Universitato. Plie, oni konstruis unu el la plej rimarkindaj profankonstruaĵoj de la renesanco en Germanujo, la Kastelon de la Elektantaj Princoj kaj serion de barokaj nobelaj palacoj, kiel, ekzemple, la Osteiner Hof, la Bassenheimer Hof, la Schönborger Hof, la Erthaler

Hof, kiuj ankoraŭ hodiaŭ elvokas la admiron de ĉiu vizitanto. Post la Kongreso de Vieno en 1815, Mainz fariĝis fortikajo de la Germana Federacio. Tio kaŭzis konstrulimigojn, pro kiuj plua evoluo dum la 19-a jarcento estis bedaŭrinde malhelpata. Tamen, Mainz aliformiĝis kiel metropolo de vinkomercio. Kiam, poste, la remparoj iom post iom estis liberigitaj por surkonstruo, enloĝis en Mainz pli grandaj industri-entreprenoj. En la urbo kaj en ĝiaj antaŭvilaĝoj ni trovas vagonfabrikojn, ŝipkonstruejojn, maŝinkonstruajn kupr- kaj celuloz- fabrikojn, meblofarejojn, hemiuzeojn, k.t.p. Post la dua mondmilito la fama Jenaer Glaswerk Schott u. Genossen (granda entrepreno por fabrikado de ĉiusecaj vitroj) malfermis tie ĉi siajn laborejojn kaj la paperfabriko Berliner Papierfabrik Max Krause trovis en Mainz novan hejmon.

Gravan sortobaton suferis Mainz, kiu jam estis detruita ĝis 80% de la bombatakoj de la dua mondmilito, per la disigo de ĝia teritorio en du partojn. La 28-an de septembro 1945 la tiama supera Komisararo de la unuigitaj militfortoj, generalo Eisenhower, proklamis, ke la Rejno, kiu fluas meze de la mainza urbttereno, estu dividlinio inter la amerika kaj franca zonoj kaj ke ĝi estu samtempe la limo inter la du landoj Hessen kaj Rejn-Palatinato. Pro tiu ĉi decido Mainz perdis antaŭ ĉio siajn industriojn kaj sian multvaloran industriterenon sur la dekstra Rejnborde.

La Mainza loĝantaro distingiĝas de la aliaj, ankaŭ najbaraj, urboj per spirita svelteco, kiu montras sin en la speciala talento plibeligi al si la ekzistadon. La mainza karnavalo estas, apude de tiuj de Köln kaj Düsseldorf, precipe konata. Ĉiuj popoltavoloj partoprenas en ĝi, kaj faras ĝin vera popolfesto. La vino ludis en la estinteco, kaj ludas ankoraŭ en la nuntempo, de Mainz, specialan rolon, kaj la muzika ĝojo de la Mainzanoj montriĝas je ĉiu okazo. Mainz posedis unu el la unuaj fiksjaj teatroj en Germanujo kaj ankaŭ hodiaŭ la vera Mainzano alportas sian amon al la Teatro.

Kiel Mainz, situante je la tranĉopunkto de la grandaj nordsudaj kaj okcident-orientaj ŝoseoj, estis jam ekde jar-miloj la ponto interkomunika inter Okcidenta kaj Meza Eŭropo, same tiel ĝi ankoraŭ hodiaŭ formas spiritan ponton en tiu ĉi mondparto.

W. Heist

## NIA FORUMO

### „La graveco de niaj Kongresoj“

Tre estimata s-ro, Auld!

En via raporto pri la marseilla kongreso vi skribas i.a.: „Tamen ankoraŭ troviĝas bedaŭrinde kelkaj ne-esperantistoj kaj esperantistoj, kiuj preferas paroli nacilingve al samideanoj. Ni esperu, ke jam en Mainz tiuj elementoj ne plu troviĝos en niaj vicoj.“

Permesu al mi, skribi mian opinion pri tiuj viaj vortoj: Anticipe mi informas vin, ke mi tute flue konversacias nian lingvon. Do mi ne defendas miajn proprajn interesojn. Ja en via senco mi estas eĉ nepra „Mal-elemento“.

Sed mi demandas vin, kiuj estas ĉi tiuj homoj, kiujn vi orgojle titolas „elementoj“?

Plejgrandparte ĉi tiuj „elementoj“ estas niaj karaj anoj, kiuj depost ofte jardekoj fidele kontribuas siajn kotizojn al nia movado, kvankam ĉi tiuj „fi-homoj“ scias, ke ili neniam kapablos paroli, do neniam atingos la plenan ĝuon de la Zamenhofa kreaĵo.

Sed ili ŝatas la „Internan Ideon“, tial ili oferas sian monon, tiel subtenante nian movadon.

Ili estas la „apogantoj“, kiujn la UEA tiel fervore rekomendas varbil Se vi (kaj aliaj superfervoraj samideanoj) nun postulas, ke ĉi tiuj „elementoj“ kaj fi-homoj „prefere ne venu al niaj kongresoj“ (Laŭ Fighiera), tamen ne estas dubo, ke logike kaj konsekvence vi certe ankaŭ rifuzos akcepti iliajn kotizojn. (Aŭ ĉu ilia „pecunia non olet“?)

Se vi nun postulas, ke ĉi tiuj „elementoj“ kaj fi-kreaĵoj estonte ne plu troviĝos en niaj vicoj, tiam eliminu **minimume** tri kvaronojn da membroj el UEA, el ĉiuj E.-unuigoj de la mondo. Ĉar laŭ miaj spertoj en- kaj eksterlandaj, la nombro de vere parolantaj gesamideanoj ne estas pli alta ol kvarono, pli ol optimisme kalkulte. Ĉiel!

Pripensu, ke inter la kongres-vizitantoj ankaŭ estas multaj E.-komencantoj, kiuj venis, por la unua fojo en sia vivo partopreni ĉi tiun unikan travivaĵon, por ĝui ĉi tiun grandiozan manifestacion.

Per viaj vortoj vi sufokas ilian kuraĝon por la daŭrigo de la lernado kaj forigas ilian simpatian por E.

„Videant consules...“

Kun la esprimo de mia alta estimo mi salutas vin

samideane

Otto Sandrock

## La Lingva Flaoso

### KIAM ONI NE KONAS FREMDAN LINGVON...

Antaŭ nelonge prezidanto de Urbkonsilantaro en Gdansk ricevis leteron de Lord Mayor de angla urbo Portsmouth. La traduko de letero elvokis sensacion. En la letero oni eklegis sekvantan parton:

„Se Estimata Sinjoro havus agrablon ekvidi Portsmouth, ni invitas Sinjoron Prezidanton, por ke Vi sur la ferdeko de unu el polaj ŝipoj ekvolus afable nin viziti“.

La tuta Urbkonsilantaro fariĝis fiera. Oni kompreneble sciigis pri la invito la gazetaron.

Intertempe troviĝis pli bona eksperto de angla lingvo. En lia traduko, la sama parto de la letero estis jena:

„Mi tre volonte rememoras viziton de unu el polaj militsipoj en Portsmouth, kiam ni havis agrablon gastigi parton de la taĉmento“.

Mienoj de la Urbkonsilantaro malpliboniĝis. Feliĉe, ke la prezidanto ankoraŭ ne forveturis.

(Laŭ „Sztandar Mlodych“)



# Martin Benka



*Flosisto*

Sur la kampo de arto la nuntempa Slovakio /CSR/ atingas siajn plej grandajn sukcesojn en la muziko /kie Mikuláš Schneider-Trnavsky, Eugen Suchon, Alexander Moyses kaj Ján Cikker akiris sukcesojn eksterlande, precipe en opero kaj simfonio/, kaj en belarto, en kiu apud Martin Benka, en internacia rilato plej signifoplenaj estas la artpentristoj Ludo /Ljudo/ Fulla, Milos Bazovsky, la grafikistoj Koloman Sokol, Vincent Hložnik, la skulptistoj Koniarek, Frano Štefunko. Ĉiuj menciitaj belartistoj estas moderne orientitaj, sed eksterlande oni valortaksas ĉefe ilian specife slovakon kontribuon al la evoluo de la monda arto.

Inter ili specialan lokon okupas Martin Benka /21.IX.1888/, kiu reprezentas en belarto la slovakon originalecon per maniero ĝis nun nesuperita. Ne nur, ĉar lia tuta arto estas inspirita de slovakaj temoj, sed ankaŭ tial, ĉar ĝi estas pentrita slovakstile. Oni povas diri, ke Benka kreis apartan slovakon kolorecon en belarto. Lia kompozicio, inspirita de la vivo de slovakaj homoj kaj naturo, havas monumentan karakteron, sed samtempe ĝi konservas la dramecon kaj lirikecon de la popola poezio. La verkaro de Benka, sintezo de lia arta pensmaniero, estas perfekta bildo de la slovakon popolo, precipe de tiu el la malriĉaj montaraj regio-

noj, kun kiuj li arte kunkreskis, kvankam li devenas el fekunda ebenaĵo.

William Ritter, la antaŭ nelonge mortinta svisa esteto kaj la plej granda eksterlanda admiranto de M. Benka, en sia pli ol 300-paĝa, ĝis nun ne eldonita monografio pri „Martin Benka, peintre slovaque”, prezentas lin kiel „kreinton de la slovakon epoko, kies unusola heroo estas la tuta popolo”.

Martin Benka studis pentroarton en Praha, kie li vivis dum multaj jaroj ankaŭ post fino de siaj studoj. Okaze de siaj studveturoj li traveturis Italujon, Francujon, Sovetion, Polujon, Germanujon, Aŭstrujon, Jugoslavion, Belgion, Nederlandon kaj Marokon. En 1941-42 li gvidis la Instituton de desegnado kaj pentrado en la slovakon Politekniko en Bratislava. Nun li vivas en Martin, la malnova kulturcentro de Slovakio. Por sia verkaro li ricevis multajn premiojn ekz. en 1940 la landan premion de Slovakio, en 1948 la Ŝtatan premion de Ĉeĥoslovaka respubliko, kaj en 1953 la prezidanto de la Respubliko deklaris lin „nacia artisto”.

Ĝis nun, kun aliaj ĉeĥoslovakaj belartistoj, li partoprenis plurajn internaciajn ekspoziciojn, ekz. en Venecio /Biennale en 1926, 1934, 1942, 1954/, en Vieno /en 1925, 1934/, en Pollando /Kra-ków, Lwów kaj Warszawa en 1927/, en



*Somere*



*Militovidino*





*Enamiĝintaj*

Sovetio /Moskvo kaj Leningrad en 1937/, en Parizo /okaze de la Monda ekspozicio/ en New-York en la galerio „IBCМ” en 1937 kaj en 1938 denove en New-York en komuna ekspozico de slokaj belartistoj. Post la II-a mondmilito li ekspoziciis en Sovetio, Ĉinujo, Koreo kaj en 1957 kun L. Fulla kaj la ĉeĥaj belartistoj li partoprenis en la IV-a Bien-

nale en la brazila São Paulo. La ekspozicion pri la vivoverko de M. Benka vizitis dekmiloj da admirantoj en Bratislava, Praha kaj aliaj urboj.

Krom monografioj pri M. Benka /kiel ekz. tiu de D-ro M. Várross en 1952/ estis eldonita tuta serio da albumoj el liaj verkoj kiel „Lulkantoj”, Gardantoj kaj defendantoj de Slovakio”, kaj „Albumo



*Survoje al herbejo*

de M. Benka” /1955/. Memkompreneble, oni skribis pri li ankaŭ en eksterlandaj gazetoj, okaze de lia partopreno en ekspozicioj.

Antaŭ 10 jaroj Martin Benka fariĝis esperantisto. Li estas ano de Esperanto-Rondeto en Martin, de E-Klubo en Praha kaj de UEA. En 1950 li aperigis /en la iama Esperantisto Slovaka en Martin/ artikol-serion pri la slovaka pentroarto. Slovaka Esperanto-Instituto eldonis serion de liaj folkloraj bildoj sur



*Instruado*

bildkartoj kiel ilustraĵojn al slovakaj polkantoj, kiujn en Esperanton tradukis Ján Valastan Dolinsky.

Car M. Benka sian tutan vivon dediĉis al la tasko: arte prezenti la slovakan popolon, la slovaka popolo konsideras lin kompetenta reprezentanto de sia vivo en arto, kvankam la formoj de ĝia vivo — precipe pro la industriigo kaj modernigo en la lastaj jardekoj — multe ŝanĝiĝis.

Martin Benka ne ĉesis krei eĉ hodiaŭ, kion pruvas, liaj monumentaj grandformataj bildoj, dekoracioj kaj la nun pentrata ĉefkurteno por la Armea Teatro en Martin.

**Josef Kuzmik**



# Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.  
\*) ricevebla ĉe U.E.A.

\* **LA FLOROJ DE L'MALBONO** de Charles Baudelaire. Kompletata eldono esperantigita de Roger Bernard, Magda Carlsson, Hilda Dresen, Kálmán Kalocsay, Lajos Tárkony, Henri Vatré kaj Gaston Waringhien, kaj redaktita de K. Kalocsay rilate al la formo kaj G. Waringhien rilate al la senca fideleco. Ilustrita kun du portretoj de la aŭtoro. Kovrilo de John Hartley. Stafeto Bel-literatura Eldon-serio, n-roj 8-9. J. Ré-gulo, eldonisto, La Laguna (Tenerife), Kanariaj Insuloj, 1957. 400 p. 16 x 22.5 cm. Prezo: 2.40 us. dol. (35 ŝteloj).

Hodiaŭ, pli ol cent jarojn post la verkado de la unuaj poemoj en *Les fleurs du mal*, Baudelaire estas ankoraŭ la unua kaj plej granda el la modernaj francaj poetoj. Li estas la gravega ĉenero inter la malnovo kaj la novo en la franca poezio, inter enradikiĝintaj kriterioj kaj teknikoj de literatura tradicio, kaj tio, kion Remy de Gourmont nomis „la emo al ĉio nova, stranga kaj eĉ bizara”.

Baudelaire estas tute speciale poeto de nia civilizo. Lia originaleco troviĝis en tio, ke, kiel klare vidis Verlaine, li pentris „la modernan fizikan homon, kia lin faris la rafinaĵoj de troega civilizo, la modernan homon, kun ties sentoj akraj kaj vibraj, ties dolore subtila spirito”. Lin interesis ĉiu aspekto de epoko urbloĝanta (antaŭ ĉio, kiel ĝin vidigis la vivo en Parizo), kun ĝiaj dinamismaj malpermanentaj elementoj kaj ĝiaj pejzaĝoj de objektoj artefaritaj kaj homfaritaj; kaj li rigardis la virojn kaj virinojn, ne kiel nerealajn figurojn en idealigita aŭ fantazia mondo, sed kiel homojn en rilato kun tiu nova ĉirkaŭaĵo. Li vidis precipe, ke ili estas viktimoj de specife moderna malsano (kaŭzita de la ĉirkaŭaĵo), nome spirita apatio. Tion li nomas *Enuo*, simpla vorto al kiu li donis la plej profundajn sugestiojn, ĉar li komprenis, ke ĝi estas la masko, kiu kaŝas kaj samtempe malkaŝas la internan haŭson de la homo.

La obsedo de Baudelaire pri tiu malsano, kaj pri ĝia komplemento: spirita sano, sentiĝas per la tonoj de amara tamen viglaga morala ironio kiu trafadenas lian tutan verkaron, kaj kiun li utiligas por trarompi la aplombon de la leganto kaj devigi reagon. Lin ĉiam koncernas fundamentaĵoj. La Romantikuloj, malgraŭ siaj pasiaj deklamadoj, restis

emocie disaj de la vivo. Kio por ili estis grava, estis, laŭ la frazo de Hugo, „la firmamento de la arto”; kio por Baudelaire estis grava, estis la homo kaj ties „interna firmamento”. Por esplori tiun nekonatan universon Baudelaire posedis eksterordinare senteman klarvidon kaj esprimkapablon. Li estis, kiel Rimbaud rekonis, granda poeto precize pro tio, ke li estis klarvidanto.

Kelkaj homoj trovas naŭza kaj malmorala la sintenon de Baudelaire. Al tio ekzistas diversaj respondoj, ĝenerale tro longaj por la kadro de la nuna recenzo. Ekzistas ekzemple la respondo de Eliot:

*Ĝis tiu grado, ke ni estas homoj, ĉio, kion ni faras, devas esti aŭ malbona aŭ bona; ĝis tiu grado, ke ni faras malbonon aŭ bonon, ni estas homoj; kaj, paradokse, estas pli bone ke ni faru malbonon, ol ke ni faru nenion: tiel ni almenaŭ ekzistas. Estas vere, ke la gloro de la homo estas lia kapablo saŭĝi; estas vere ankaŭ, ke lia gloro estas lia kapablo damniĝi. La plej malbonan, kion oni povas diri pri niaj malbonfarantoj, de ŝtatistoj ĝis ŝtelistoj, estas tio, ke ili ne estas sufiĉe kuraĝaj por damniĝi. Baudelaire estis sufiĉe kuraĝa por damniĝi: ĉu li ja estas damnita, kompreneble, estas alia demando, kaj nenio malhelpas, ke ni preĝu por lia ripozo. (Enkonduko al la „Intimaj Taglibroj” de Baudelaire.)*  
Persone, mi preferas la respondon de Pound:

*Kiel en medicino ekzistas la arto diagnozi kaj la arto kuraci, tiel en la artoj, tiel en la specifaĵoj de poezio kaj de literaturo, ekzistas la arto diagnozi kaj ekzistas la arto kuraci. Oni nomas unu la kulto de malbela kaj la alian la kulto de bela. La kulto de bela estas la higieno, ĝi estas suno, aero kaj la maro kaj la pluvo kaj la sinbando en lagoj. La kulto de malbela, Villon, Baudelaire, Corbière, Beardsley, estas diagnozo. (La Serioza Artisto).*

Morala problemo ĉiam havas du flankojn, kaj al neniu profitas, sin forturni de la malbela aspekto. Kiu esploras la maluman flankon de la vivo — ĝin diagnozas — faras grandan kontribuon al la kompreno pri, kaj sekve al la solvo aŭ kuraco de, niaj grandaj kaj urĝe gravaj moralaj problemoj. Sen kompreno ne ekzistas moralo.

La esperanta traduko, kiu formas la

duoblan numeron 8-9 de la serio Stafeto, estas, kiel oni atendus pro la aparta taŭgeco de nia lingvo kaj pro la konata talento de la du redaktoroj kaj ĉeftradukintoj, vere unuaranga. Dum multaj jaroj mi estas ŝatanto de la poemaro de Baudelaire, en la originalo kaj ankaŭ en du anglalingvaj tradukoj. Unu el tiuj anglaj tradukoj estas verko de Roy Campbell, vere elstare kapabla poeto kaj tradukisto; mi trovis tre instrua la komparadon de lia traduko kun la esperanta kaj kun la originalo, kaj mi ne hezitas aserti, ke la esperanta traduko estas absolute kaj en ĉiuj rilatoj supera al la angla. Mi tre bedaŭras, ke nun mankas al mi spaco por doni detalan komparon; mallonge, mi formis la opinionon, ke la angla lingvo simple ne taŭgas por doni adekvatan tradukon el la franca: la du lingvoj estas tro malsimilaj inter si, dum Esperanto bonege adaptiĝas al la specialaĵoj de ĉiuj lingvoj. Ekzemple, estas tre evidente, ke la angla kvinjamba ne redonas la etoson de la franca aleksandro, dum Esperanto kapablas transporti ambaŭ formojn senpene. Kiel malgrandan specimenon mi tamen aldonas unu strofon el la poemo „La Balkono” (laŭ Valéry, unu el la plej belaj el la poemoj de Baudelaire), unue laŭ la originalo:

*Ces serments, ces parfums, ces  
baisers infinis,  
Renaîtront-ils d'un gouffre interdit  
à nos scondes,  
Comme montent au ciel les soleils  
rajeunis  
Après s'être lavés au fond des mers  
profondes?  
— O serments! ô parfums! ô baisers  
infinis!*

due laŭ traduko de Campbell:  
*These vows, these perfumes, and  
these countless kisses,  
Reborn from gulfs that we could  
never sound,  
Will they, like suns, once bathed in  
these abysses,  
Rejuvenated from the deep, rebound —  
These vows, these perfumes, and  
these countless kisses?*

kaj laste laŭ traduko de Kalocsay:  
*Ĉu l'juroj, la parfumoj, la kisoj plu  
sen fino  
Revivos el l'abismo tabua al la sondo,  
Kiel reunigitaj la sunoj el mar-sino  
Sin levas, laviĝinte en plej profundaj  
ondoj?  
— Ho juroj! Ho parfumoj! Ho kisoj  
plu sen fino!*

La graveco de tradukoj kiel „La floroj de l' malbono” ne estas troigebla. Tiu ĉi traduko prenas sian lokon apud „Hamleto”, „Infero”, „Sinjoro Tadeo” kaj „Peer Gynt” kiel triumfa pravigo de nia lingvo kaj nia kulturo. Por la unua fojo aperas en Esperanto la kompleta poemaro de unu el la mondaj geniuloj, kaj ni ne povas sufiĉe danki al la geniaj kaj laboremaj tradukintoj, kaj al la eldonejo Stafeto, pro tiu ĉi gravega riĉigo kaj armigo de nia afero.

W. Auld.



Profito de la 42a U.K.

Multaj esperantistoj, kiuj sekvis kun streĉo la malfacilaĵojn de la 42a U.K. en Marseille, kaj eĉ morale aliĝis por ĝin finance subteni, demandis al si pri ĝia ekonomia rezulto: konkrete, ĉu ĝi havis deficon.

La definitiva bilanco aperos en Jarlibro II 1958, sed ni ĝojas jam nun informi la esperantistaron, ke

dank' al lastmomenta granda subvencio de la franca registaro, al multnombra fluado de moralaj aliĝoj kaj al la kresko de la efektivaj kongresanoj en la lastaj monatoj, ne nur ĉiu ombro de deficio estas definitive forigita, sed ke restis profito, kiu estos utiligata por la disvastigo de Esperanto, en la formoj fiksitaj de la Kongresa Regularo.

G. C. Fighiera, K.K.S.

## ESPERANTISTA VIVO

### Naskiĝoj

**Duthilleul**, Bruno Duthilleul (35 Rue de Bayeux, Caen, Francujo) anoncas kun plezuro la naskiĝon, la 25an de septembro 1957, de sia fratineto Marie.

### Geedziĝoj

**Milton-Harmainen**, La 19an de marto 1957 geedziĝis R. J. Milton, FD de UEA, kaj Pirkko (Pipa) Harmainen, finna samideanino, en Helsinko. Nuna adreso: Trakk'ampujankatu 16 A 6, Helsinko.

# UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

## OFICIALA INFORMILO

La 1-an de novembro 1957.

N-ro 299

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de oktobro kaj ankaŭ por komparo, je la fino de oktobro 1956:

	1956	1957
Asociaj membroj	15280	15159
Individuaj membroj		
MJ	948	818
MA	4386	5506
MS	735	678
Pat.	9	5
DM	292	303
HM	54	52
JMJ	—	15
JMA	—	100
	4624	7477
	21704	22636

### NOVA ĈEFDELEGITO

Görlich, Prof. D-ro E. J., Währingerstr. 59, Wien IX, Aŭstrujo, Pĉk: 30461.

### DELEGITOJ

#### Alĝerio

**Nemours** (Tlemcen) D: S-ro Fernand Micoud, instruisto, BP 88. FD (edukado): la D.

#### Brazilo

**Baturité** (Ceará) FD (medicino): vakas.  
**Rio de Janeiro** FD (religio: Baptista): S-ro Joao Olivio Melo, publika oficisto, Rua José dos Reis, 1414 - Pílares. FD (sukerfabrikado): S-ro Bianor Collect de Araujo, industroficisto, Av. Oliveira Bello, 112 - V. Jardim de Penha.

#### Belujo

**Leuven** FD (ŝu-kaj vesttranĉado): Frato Arni Decorte, religiulo, Sankta Kamilo Instituto, Bierbeek.

#### Britujo

**Bingley** (Yorks.) D.: Sino Ethel Ed-

mondson, teksajisto, 6 Raven Street.

**Bradford** (Yorks.) VD: S-ro Norman Townson, paperkomercisto, 19 Westfield Lane, Wrose, Shipley.

**Chalfont St. Giles** (Bucks.): D.: vakas. FD. (instruado): vakas.

**Derby** (Derbys.) D.: S-ro Frank Herbert Brookes, instruisto, 41, Mostyn Avenue, Littleover.

**Folkestone** (Kent) FD (antibiotikoj): F-ino Ruby D. Tabram, sekretariino, 34, Bradstone Avenue.

**London** VD: S-ro John Beresforde, instruisto, St. Paul's Canonbury Church of England School, Dove Street. FD (edukado): la VD (Beresforde).

**Queensbury** (Yorks.) D.: S-ro Norman Harry Naylor, instruisto, 8 Greenland Villas.

**Ventnor**, I.W. FD (kvakerismo): S-ino Agnes Jessie Saunders, dommastrino, Sydney Lodge, Bath Road.

**Whitworth** D.: vakas.

#### Finnlando

**Lohja**: D.: vakas.

**Karkkila** D.: S-ro Vilho Nyström, instruisto, Yhteistalo A29.

**Vaasa** FD (turismo), S-ro Semmi Hautamäki, emerito, Rantakatu 26.

#### Francujo

**Bugeat** (Correze) D.: S-ro Guy Tatet, arbara gardisto, Nario Strato.

**Clermont-Ferrand** (Puy-de-Dôme) FD (turismo kaj komerco): F-ino Carlita Hueter, sekretariino, 12, rue des Jacobins.

**Dieppe** (Seine Maritime) FD (akvodistribuo): S-ro Bernard Noël, akvdistribuestro, Quai du Tonkin 9.

**La Garenne-Colombes** (Seine) D.: S-ro Michel Duc-Goninaz, studento, 5 rue Fernand Drouilly.

**Moulins** (Allier) FD (instruisto): S-ro Gabriel Mussier, instruisto, Ecole rue du Jen de Paume.

**Muret** (Haute-Garonne) D.: vakas.

**Pinsaguel** (Haute-Garonne) D.: S-ino Louise Dupont, „Le Scarabée”, Chemin du Château.

**Romans** (Drôme) VD: F-ino Nénette Romanat, statoficistino, 7 rue Edouard Vaillant.

**Rouen** D.: vakas.

#### Germanujo

**Celle** (Niedersachsen) D.: S-ro Werner Murza, instruisto, Heidbrink 1.

**Craillsheim** (Württemberg) FD (komerco): S-ro Bruno Vogelmann, komercisto, Pistoriusstrasse 50.

**Frankfurt Main** (Hessen) FD (elektrotekniko): S-ro Alfred Warner, Dipl. ing., per adr. VDE-Prüfstelle, Osthafenplatz 6.

**Göttingen** FD (grafologio): vakas.

**Heidelberg** (Baden) FD (interpretado: simultana kaj konsekutiva): S-ro Joseph Janoschka, interpretisto, Plöck 56a.

**Homburg** (Sarlando) D.: S-ro Oskar Höh, fervojisto, Goethestr. 12. FD (fervojo): la D.

**Kiel** (Schleswig-Holstein) FD (ekonomia kaj politika sciencoj), S-ro Werner Bormann, sciencia oficisto, Blocksberg 8.

**Mühlacker** (Württ.) D.: S-ro Adolf Burkhardt, vikario, Enzstr. 21.



# STAFETO 1957

Por la unua fojo en nia historio, STAFETO prezentas la tutan poemaron de grava eŭropa poeto, en 400-paĝa, duobla volumo de la beletra serio:

## CHARLES BAUDELAIRE:

LA FLOROJ DE L' MALBONO  
kompleta eldono sekvata de  
LA DEFALAJOJ kaj FRAGMENTOJ  
en redakto de  
K. KALOCSAY kaj G. WARINGHIEN

Kaj apud tiu evento, STAFETO ĝojas anonci la debuton de nova, popular-sciencia eldon-serio per la originala verko de nia botaniko fakulo

## PAUL NEERGAARD:

LA VIVO DE LA PLANTOJ

kiun akompanas preskaŭ 100 delikataj desegnaĵoj de la dana libroilustristo

MADS STAGE

Fine, per ekskurso en ankoraŭ novan kampon, tiun de la originala versdramo, STAFETO kompletigas sian unuan dekon de la beletra serio; temas pri

## J. D. APPLEBAUM:

JOZEFO

drama poemo en kvar aktoj kaj epilogo, bazita sur la biblia rakonto.

Ankoraŭ haveblaj, sed certe baldaŭ elĉerpotaĵoj pro akcelritma disiro:

RETO ROSSETTI: *El la maniko*

FERENC SZILÁGYI: *Koko krias jam!*

MARJORIE BOULTON: *Kontralte*

GASTON WARINGHIEN:

*Eseoj I. Beletro*

WILLIAM AULD: *La infana raso*

★ ★ ★

La librojn liveras la eldonisto, J. RÉGULO, Apartado 25, *La Laguna*, Tenerife, Kanarioj; UEA, kaj ĉiuj gravaj centroj de la Movado.

*Kunhelpu pluporti la torĉon!*

Aperos dum Decembro!

# ANGLA ANTOLOGIO

1000 - 1800

Redaktoroj:

AULD kaj ROSSETTI

kun multaj kunlaborintoj  
320 p., bindita

Prezo: 10 ned. gld. (40 steloj)

Mendu tuj de U.E.A.!

# NORDA PRISMO

la valora kultura revuo, sub redaktoreco de d-ro F. Szilagyi, aperos dum 1958 per kvin interesaj, ilustritaj numeroj.

Abonprezo: 2 us. dol. 10 sv.kr.

★

Favorprezo antaŭ la 15-a de decembro 1957:  
1,60 us. dol. 8 sv. kr.

Mendu ĉe U.E.A. aŭ ĉe

Norda Prismo. Barnhusgatan 8. Stokholmo. Svedujo.

# la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de Prof. G. Waringhien kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj aperas ĉiun duan monaton 32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R Fiquet, Poŝta konto 2259-98 Marseille

Atilande:

Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio:  
7. Av. Léon-Gourdault  
Cholsy-le Roi (Seine)

Administracio:  
5. Bd. Stalingrad  
Nice (A-M)

Francujo.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam



REVUO  
**ESPERANTO**  
INTERNACIA

**50 a Jaro**

**1957**

*Redaktoro:*  
**Mag. William Auld**

*Oficiale organo de*  
**UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO**  
(en konsultaj rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

*Administracio:*  
Eendrachtsweg 7, ROTTERDAM-C., Nederlando

*Redakcio:*  
Knockfarril, Thornside Road, JOHNSTONE,  
Renfrewshire, Skotlando



# enhavo 1957

Alvoko al la instruistoj. <i>E. Malmgren</i> . . . . .	38
Agado en proksima oriento (APO) . . . . .	60

## Artikoloj: esperantismaj

Busto de D-ro Zamenhof . . . . .	167
Ĉu sufiĉas varbadi? <i>J. Francis</i> . . . . .	53
Ĉu universala aŭ helpa lingvo? . . . . .	161
De Portugalujo ĝis Finnlando . . . . .	94
Duobla traduko . . . . .	189
Esperanto en fakaj kongresoj. <i>E. Privat</i> . . . . .	17
Esperanto-literaturo reprezentata en Konferenco de aziaj verkistoj. <i>T. Sekelj</i> . . . . .	46
Grava kvinjara datreveno. <i>H. W. Holmes</i> . . . . .	33
Idoloj kaj generacioj. <i>J. Fayot</i> . . . . .	93
Kelkaj pensoj pri la internacia lingvo kaj ĝia literaturo. Intervjuo kun Akad. Ivo Rotkvić . . . . .	34
La esperantista junularo. <i>I. Lapenna</i> . . . . .	4
La graveco de niaj kongresoj . . . . .	78
La momento por ekinstrui. <i>I. Lapenna</i> . . . . .	145
La satelito kaj ni . . . . .	177
La uzo de Esperanto en la scienco. <i>P. Neergaard</i> . . . . .	54
Lingvo kaj kulturo. <i>R. Watier</i> . . . . .	48
Nia popolo. <i>Metodi Panĉev</i> . . . . .	73
Pri la unua Universala Kongreso . . . . .	81
Reciproka reklamado . . . . .	159
Sukcesa eksperimento . . . . .	173

## Artikoloj: ĝeneralaj

Babilaĵoj . . . . .	168
Cezanne, pentristo malbenita. <i>H. Perruchot</i> . . . . .	41
Gabriela Mistral . . . . .	62
La tera sano. <i>Eve Balfour</i> . . . . .	148
Mainz. <i>W. Heist</i> . . . . .	191
Mainz la ora. <i>G. C. Fighiera</i> . . . . .	168
Preslibereco kaj presdeliktoj . . . . .	185
Spacfikcio kaj sciencaj faktoj . . . . .	23
Tra la romaj postsignoj en Provenco . . . . .	64
Unika formo de muziko por gejunuloj . . . . .	140

## Artikoloj: oficialaĵoj

Akceptitaj statutŝanĝoj . . . . .	24
Ĉiu kunlaboro en la varbado de apogantoj	1
Deklaro de KELI . . . . .	10
Esperanto-Revuo de UEA: Memortago anstataŭ jubileo! <i>H. Jakob</i> . . . . .	179
Helpu al la hungaraj rifuĝintoj . . . . .	2
Komuniko de la Estraro . . . . .	10
Nova granda progreso de informado pri Esperanto . . . . .	117
Skribu tuj poŝtkarton . . . . .	14
Tabela trarigardo pri la informa fako en 1956 . . . . .	116
Trijara Kunlaboro de UEA kun UNESKO	180
Belarta aldono al la revuo „Esperanto” . . . . .	154

## Centro de esploro kaj dokumentado (CED)

Alvoko al radio-aŭskultantoj . . . . .	120
Alvoko al universitataj profesoroj esperantistaj . . . . .	39
14000-15000 esperantistoj survoje . . . . .	151
15101 elsendoj en Esperanto post la milito	39
Donacoj por CED . . . . . 24, 120, 151,	184
Du novaj gravaj dokumentoj . . . . .	120
Eldono de la dokumento CED/5 . . . . .	39
Enketo pri la denaskaj esperantistoj . . . . .	60
Esperantlingvaj tradukoj en „Index Translationum” . . . . .	39
Esperanto en UNESKO-dokumentoj kaj publikaĵoj . . . . .	60
Esperanto-stratoj en la mondo . . . . .	24
Grava kvinjara datreveno . . . . .	33
Jubilea verkaro dediĉita al Dro Seiho Nishi	120
Kiuj landoj helpas al la laboro de CED? . . . . .	24
La financa situacio . . . . . 120,	151
Mallongaj informoj . . . . .	184
1000a dokumento de CED . . . . .	120
1428 Radio-elsendoj en 1956 . . . . .	24
Rezultoj de la enketo pri la denaskaj kaj aliaj infanoj parolantaj Esperanton . . . . .	184
UEA komisiita gvidi subgrupon de NRO de UNESKO . . . . .	14
UNESKO eldonas fotoafiŝojn kun teksto en Esperanto . . . . .	120

## Ĉefartikoloj

Decidoj de la paska kunsido de la Estraro	73
Estanteco kaj estonteco. <i>M. H. Vermaas</i> . . . . .	161
Iom pri informado. <i>W. Auld</i> . . . . .	145
Kion vi atendis? <i>M. H. Vermaas</i> . . . . .	17
La kongreso estas preta. <i>G. C. Fighiera</i> . . . . .	93
Nia atuto. <i>W. Auld</i> . . . . .	53
Pli da delegitoj! <i>G. Canuto</i> . . . . .	1
Sepdek jaroj de la Internacia Lingvo. <i>I. Lapenna</i> . . . . .	109
Serioza kaj impona manifestacio en Marseille. <i>W. Auld</i> . . . . .	125
Zamenhof kaj Tolstoj. <i>E. Privat</i> . . . . .	177

## Dramo

<i>Trudić, Božidar</i> : La malamiko . . . . .	55, 83
Esperantista vivo . . . . . 4, 28, 38, 68, 95, 114, 115, 167	
Esperanto aprobita de la 6a Amerika Kongreso de Edukistoj . . . . .	74
Grajnoj en vento . . . . .	87, 111, 153

## Ilustraĵoj

Beltran, Jaime . . . . .	30, 46, 64, 101, 112, 113, 169
Hamburg, Borge . . . . .	82
Milton, John . . . . .	6, 58, 62
Morrison, John . . . . .	97
Wranka, Dragutin . . . . .	13, 137
Internacia lingva humoro . . . . .	63



### Kongresraporto de la 42a U.K.

Akademio de Esperanto . . . . .	134
Akcepto de la kongresanaro . . . . .	134
Amuzaĵoj . . . . .	136
Antaŭkongreso de Parizo . . . . .	147
Belarta konkurso . . . . .	128
Diservoj . . . . .	135
Dua Internacia Infankongreseto . . . . .	135
27a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj . . . . .	136
Enlandaj prelegoj . . . . .	128
Fakaj kaj neneŭtralaj organizaĵoj . . . . .	132
Festparolado de Prof. D-ro Ivo Lapenna . . . . .	126
Gazetara servo . . . . .	134
Internacia Somera Universitato . . . . .	128
Komitato de UEA - Decidoj . . . . .	132
Kunveno de la fervojistoj . . . . .	153
Laboro de la sekcioj . . . . .	130
La ĝeneralaj kunvenoj . . . . .	129
La Kongreso filmita . . . . .	135
La Solena Fermo . . . . .	136
La Solena Inaŭguro . . . . .	126
Radio . . . . .	135
Teatra vespero . . . . .	129
Koresponda Servo	
Mondskala . . . . .	68, 121, 158, 166, 190
Kulturaj Internaciaj Ferioj . . . . .	146
42a Universala Kongreso	
9, 28, 44, 70, 78, 89, 105, 110, 111, 195	
43a Universala Kongreso . . . . .	162, 183
La Internaciaj Konkursoj	
30, 51, 61, 79, 107, 124, 144, 176, 186	

### La Juna Vivo

Alvoko al amikoj de la eŭropa movado . . . . .	102
Ankoraŭ pri laborkampoj . . . . .	40
Ĉiam ĝoja . . . . .	3
13a Internacia Junular-kunveno . . . . .	102, 156
2a Internacia Junular-renkonto amika . . . . .	115
En novaj vestoj kun novaj fortoj antaŭen! . . . . .	182
Esperantistaj tendaroj en ĈSR . . . . .	173
Esperanto bezonas la junularon . . . . .	3
Esperanto-junularo de Svislando . . . . .	40, 56
Esperanto-societo ĉe Eksterland-instituto Dortmund . . . . .	65
Eŭropa Junulara Tendaro . . . . .	103
Internacia junular-kunveno en Groet . . . . .	3
Internacia junular-kunveno sur Feldberg . . . . .	115
Internacia renkontiĝo por studentoj . . . . .	183
Internacia seminario de Germana Esperanto-Junularo . . . . .	173
Internacia Studenta Kurso „Homo kaj maŝino” . . . . .	102
Junulara fako de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro . . . . .	85
Junularo rondo „Zamenhof” en Urugvajo . . . . .	85
Kion ni proponas . . . . .	29
Konscia admono de adepto . . . . .	115

4a interzona renkontiĝo Berlin 1957 . . . . .	40
Laborkampo en Nederlando . . . . .	85, 115
Labortendaro en Britujo . . . . .	29
La esperanta renkontiĝo en la Vĉa Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj en Moskvo . . . . .	172
Logiko . . . . .	103
Manifestacio en Hungarujo . . . . .	102
Pri la laboro de la hungara esperantista junularo . . . . .	173
6a Junulara Festivalo . . . . .	102
Skirestado de Esperanto-junularo de Svislando . . . . .	183
TEJO-Skisemajnoj 1956-'57 . . . . .	40
3aj TEJO-Skisemajnoj . . . . .	172, 182
Turniro por la gejunuloj . . . . .	29
Vigligas agado de la esperantista junularo en Maribor . . . . .	115
La lingva haoso . . . . .	87, 103, 167, 191
La Universala Ekspozicio . . . . .	39
Magnetofona Servo de UEA . . . . .	178

### Monda Galerio

Benka, Martin . . . . .	192
Beŝkov, Ilija . . . . .	80
Daumier, Honoré . . . . .	138
Meksika pentroarto . . . . .	96
Stajkov, Veselin . . . . .	80
Nekrologo	
4, 28, 38, 68, 106, 114, 160, 167, 178	
Nia forumo . . . . .	90, 105, 123, 170, 191
Niaj konkursoj	
4, 28, 35, 63, 89, 103, 139, 158, 170	

### Novaj Libroj

<i>de Amicis, Edmondo</i> : Italaj rakontoj . . . . .	175
An Esperanto Vocabulary . . . . .	104
<i>Auld, W.</i> : La infana raso . . . . .	49
<i>Baudelaire, Charles</i> : La floroj de l'malbono . . . . .	194
<i>Bland, Richard</i> : Esperanto from Bjelostok to Montevideo . . . . .	88
<i>Christensen, Nils</i> : La fingro de la diablo . . . . .	123
Esperantologio . . . . .	88
Gorenjsko dum paco, sufero, lukto kaj libero . . . . .	122
Jarlibro de SAT 1956-57 . . . . .	175
Kagujahime kaj alia . . . . .	88
Katalogo de esperantaj glumarkoj . . . . .	88
Kie estas la mortintoj? . . . . .	88
<i>Kobielski, Dobrosław</i> : Varsovio . . . . .	88
<i>Kumbel</i> : Gruk . . . . .	50
<i>Lapenna, E.</i> (red): Teatro en societo . . . . .	50
La vojo de la vero kaj la saĝo . . . . .	104
<i>Muŝic, Zoran</i> : Morfologia atlaso de homa dentaro . . . . .	88
<i>Nisimura, Masao</i> : Edelvejso . . . . .	104
<i>Nuŝic, B.</i> : Suspektinda persono . . . . .	50
<i>Orzesko, E.</i> : A . . . B . . . C . . . . .	175
<i>Ossaka, K.</i> : El orienta florbedo . . . . .	174



Paŝo post paŝo . . . . .	174
<i>Prevost, A.G.</i> : Tajpado . . . . .	88
Resuma historio de la Esperanto-movado	104
<i>Ribillard, Jean</i> : Vagado sub palmoj . . . . .	123
<i>Rimanto, Nenjo</i> : Ludiloj . . . . .	88
<i>Sekelj, A.</i> : Rakontoj . . . . .	104
Sennacieca Revuo n-ro 85 . . . . .	174
Scio-Belo-Lingvo . . . . .	88
<i>Vanselow, Karl</i> : Nia lingvo Esperanto . . . . .	88
<i>Voltaire</i> : Tri verkoj . . . . .	12
<i>Waringhien, G.</i> : Eseoj I: Beletro . . . . .	11
Oficiala Informilo	
15, 31, 51, 70, 90, 106, 124, 143, 160, 176, 195	
<b>Poezio</b>	
<i>Bilac, Olavo</i> : Inania verba . . . . .	165
<i>Boulton, Marjorie</i> : Gratvundoj . . . . .	45
Hejmbesto . . . . .	45
La katido dormas . . . . .	45
Preĝo de katido . . . . .	45
<i>Dondi, Enrico</i> : Novembro . . . . .	57
<i>Ferlin, Nils</i> : Feliĉo kaj amo . . . . .	103
<i>Hood, Thomas</i> : La ĉemizokanto . . . . .	166
<i>Kalocsay, Kálmán</i> : Letero al William Auld	152
<i>Losada, B.</i> : Poŝtkartoj de turisto . . . . .	98
<i>Mistral, Gabriela</i> : La peto . . . . .	62
<i>de Oyarzabal, Juan</i> : Ĉe l'bordo de l'rivero .	165
<i>Ragnarsson, Baldur</i> : Al ni Genez' proklamas . . . . .	27
Kristo . . . . .	27
Nokta penso . . . . .	27
Perdita poeto . . . . .	27
<i>Simazaki, Toŝon</i> : Apud la kastel' malnova de Komoro . . . . .	141
Blanka muro . . . . .	141
Liriko ĉe vojaĝo al rivero Tikuma . . . . .	141
Oriento, okcidento, sudo kaj nordo . . . . .	141
Stelo falanta . . . . .	141
Radio . . . . . 13, 30, 72, 89, 108, 121, 140,	190
<b>Radio-Babiloj</b>	
Esperanto dissendoj el Brazilo . . . . .	142
Internacia kontakto per kaj por la bona volo . . . . .	168
Paperaj aplaŭdiloj . . . . .	69
Radio Roma . . . . .	168
Svisa kurtonda radio . . . . .	142
„Svislando vokas” . . . . .	69
<b>Rakontoj</b>	
<i>Boulton, Marjorie</i> : Fremdeco . . . . .	163
<i>Francis, John</i> : La batalo ĉe Go . . . . .	112
Momentfoto . . . . .	82
<i>Hattyar, H.</i> : Mia ferio . . . . .	99
<i>Jennings, H.</i> : La bovo . . . . .	58
<i>Mistral, Frédéric</i> : Vagado dum la kurso-tempo . . . . .	8
<i>Ramperti, Marco</i> : Fajraĵoj en la nokto . . . . .	6
<i>Schöninge, Franz Josef</i> : Sinjoro Birg . . . . .	97
<i>S'horj, Ŝ. J.</i> : Plantado . . . . .	36
<i>Williams, Denis</i> : Ne tro ofte voku „lupojn”	22

Reprezentanto de UEA prezidas kunvenon de NRO en la UNESKO-domo . . . . .	43
Ridet . . . . .	188
Sennacieca Asocio Tutmonda . . . . .	26, 157
Somera Pedagogia Semajno en Kranjska Gora . . . . .	147
Statistiko pri nia membraro en 1956 . . . . .	52
Ŝaka rubriko . . . . .	159, 189

*Tra la mondo kaj esperantismaj informoj*

Argentino . . . . .	43, 66
Aŭstrujo . . . . .	87, 111, 171, 187, 188
Belgujo . . . . .	90
Brazilo . . . . .	2, 30, 47, 66, 67, 100, 101, 110, 153, 160, 162, 187, 188
Britujo . . . . .	5, 43, 67, 87, 101, 110, 154, 171
Bulgarujo . . . . .	5, 21, 43, 67, 69, 86, 110, 171, 187, 188
Ĉeĥoslovakio . . . . .	5, 43, 86, 154, 171, 187
Ĉilio . . . . .	5
Ĉinujo . . . . .	43, 86, 169
Danujo . . . . .	66, 79, 86, 111, 155, 187
Estonujo . . . . .	43
Finnlando . . . . .	101
Francujo . . . . .	5, 21, 43, 67, 101, 155, 159, 171, 188
Germanujo . . . . .	5, 21, 66, 86, 100, 119, 155, 167, 171, 181, 187
Gvatemalo . . . . .	171
Hindujo . . . . .	86, 101
Hispanujo . . . . .	21, 26, 43, 87, 110, 154, 171, 188
Hungarujo . . . . .	87, 110, 154, 171, 187, 188
Islando . . . . .	21, 187
Israelo . . . . .	21, 43
Italujo . . . . .	43, 67, 86, 100, 110, 111, 155, 187
Japanujo . . . . .	20, 26, 45, 100, 171
Jugoslavio . . . . .	43, 66, 100, 110, 114, 159
Kanado . . . . .	5
Latvujo . . . . .	43
Litovujo . . . . .	187
Madejro . . . . .	171
Maroko . . . . .	31
Nederlando . . . . .	100, 157, 187
Nepalujo . . . . .	44, 169
Norvegujo . . . . .	5, 154, 155, 187
Novzelando . . . . .	100, 169, 171
Pollando . . . . .	12, 21, 43, 67, 86, 95, 100, 111, 154, 155, 187, 188
Portugalujo . . . . .	86, 101, 111, 155, 171, 188
Rumanujo . . . . .	66, 119
Sovetunio . . . . .	66, 86, 171
Svedujo . . . . .	139, 187
Svislando . . . . .	21, 67, 111
Urugvajo . . . . .	5, 66, 154
Usono . . . . .	5, 25, 67, 111, 169, 171, 187
Vjetnamo . . . . .	43, 154
UEA estis reprezentata en la 9a Konferenco de UNESKO . . . . .	18
Via kongresa vojaĝo . . . . .	76